

Bô Yin Râ

LA LIBRO  
DE INTERPAROLOJ

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG  
BERN

La civitana nomo de Bô Yin Râ estis  
Joseph Anton Schneiderfranken

El la Germana originalo  
(„Das Buch der Gespräche“, eldono de 1958)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

Dua eldono 1958  
La unua eldono aperis ĉe Verlag der Weissen Bücher,  
München, 1920

© 1958  
ĉe Kober Verlag Bern, Svislando

## KONFESO\*

*Stelojn* mi vidis ekbrili, / kiujn neniu antaŭ  
mi vidis, – / plejproksimaĵo devis mergiĝi,  
/ plejforaĵon mi ekvidis proksime...

*Sonojn* mi perceptis, / kiujn nur malofte iu  
aŭdis, / vortoj venis al mi, / kiujn „*la vor-*  
*to*“ prenis el la *pravorto*...

Kiu *antaŭ* mi estis „*majstro*“, / kiel „*fra-*  
*to*“ donis al mi la manon; / tiel mi saniĝis  
de „*revado*“, / tiel mi trovis la *lumantan*  
*london*. – –

Mi tie ricevis la „*konsekron*“ / post multja-  
ra plenumado de devo: / la filoj de plej altaj  
potencoj / kondukis la „*fraton*“ al *lumo*.

Nun mi estas droninta en „*lumo*“, / kiel gu-  
to en la eterna maro. / Kion mi lasis mal-

---

\* Por lasi la sencon de la teksto neŝanĝita, mi rezignis la provon redoni la rim-  
versan formon de tiu ĉi ĉapitro. Sekvas do fidela traduko en prozo.

antaŭ mi, tio mergiĝis, / kaj la tempo, kiam  
ĝi vivis, malpleniĝis.

Mi trovis, kion trovis nur malmultaj; / mi  
vidis, kion vidis nur raraj. / Mi spertis,  
estante ligita al la tero, / la estiĝon de mia  
„*eterna regno*“ ...

Sed se mi iam volus ne plu doni / al la *tero*  
mian profundan *amon*, / tiam ankaŭ mia a-  
nimo devus / fuĝi el la *lumanta lando*...

## SCIO KAJ OKAZADO

Kiam, post longa tempo, mi ree tenis en mia mano tiun de mia alta instruanto, al kiu mi ŝuldas *ĉion*, kio doniĝis al mi, – kiam mi unuafoje vidis lian bonkore afablan okulon brili en la suno de l' sudo kaj aŭdis la mildan sonon de lia voĉo, mi diris al li, kiom granda estas mia ĝojo ricevi nun el lia buŝo tiun finan *scion*, kiu fariĝas eksciebla nur al tre malmultaj homoj sur tiu ĉi tero, kaj mi tiutempe ankoraŭ kredis, ke tiu scio estas nenio alia ol la instruo de sekreta „*scienco*“, tute simila al la sciencoj de tiu ĉi tero, sed tradiciebla nur al bone elprovitaj disĉiploj. – –

La alta majstro rigardis min ridetante kaj silentis longe.

Tiam li parolis:

„Vi estas tipa okcidentano! Kion oni donas al vi ne kiel ‚sciencon‘, tio ŝajnas al vi dubinda, kaj vi ne kuraĝas fidi la veron, se ĝi ne renkontas vin en la vesto de ‚scienco‘, en la senco, en kiu oni uzas tiun vorton en viaj altaj lernejoj. –

Vi devos *lerni ion alian*, mia amiko!

Vi devos lerni kompreni *alian* specon de instruado, ol estas *tiu*, kiu *sola* validas en viaj landoj. — — —

Se vi volas veni al la *vero*, vi devas antaŭ ĉio forigi el vi la *eraran ideon*, ke *vero* estas ‚*scio*‘!

Via strebado devas ekde nun esti direktita al *io alia*.

Vi devas peni explore ekkoni *okazadon!* — —“

Post plia tempo de silentado li diris:

„La mondo de la animo estas konstanta *okazado*.

Ne aliamaniere la mondo de la animo povas malkaŝiĝi al vi ol per tio, ke vi *eniras* en tiun mondon al teraj sensoj *nepercepteblan*, kiel *atestanto* de ĝia *okazado*.

Nur tiam vi trovos *tiun* saĝon, pri kiu eĉ la plejsaĝulo povas ‚*scii*‘ nenion, sed pri kiu *vere scias* nur *tiu*, kiu en si *spertis* tiun *okazadon* kaj *ĉiuhore* kapablas *nove sperti* ĝin...“

Kiam la honorinda instruanto estis fininta tiun parolon, longe regis granda kvieto, kelkfoje

interrompita nur de la moka krio de piprobirdo. La majstro rigardis foren super la arĝente verda nubajo de la olivarbaretoj, dum en mia menso mi formis la demandon, ĉu eble tamen *certa ŝtupo de kulturo kaj scio* estas nepra kondiĉo ankaŭ por *tiu* maniero de ekkonado.

La altulo, kiu estis observinta la estiĝon de mia demando kaj leginta ĝin en mia spirito (ĉar li nur malfacile komprenis mian lingvon kaj tial devis, kvankam estante tute proksima, estiĝi interkompreniĝon en spirita maniero), denove ekparolis:

„Kultura alteco, scio, erudicio, estetika sento, filozofio, la kapablo aprezi arton, – koncize: ĉio, pri kio vi pensis, formante vian demandon, estas aferoj tute *indiferentaj* por atingi finan *ekkonon de la vero*. –

Tio, kion *vi* nomas *filozofia spekulativado* kaj kio estis praktikata precipe en mia lando dum jarmiloj (oni povus rigardi mian landon eĉ kiel la *lulilon* de tiu maniero praktiki *sciencon*), efikas preskaŭ *malhelpe* sur la spiritajn fortojn, kiuj povas havigi al la homo la spertadon de anima-spirita *okazado*. –

Tie ĉi *niaj* erudiciuloj *eraras*, se ili kredas esti *trovintaj* finan ekkonon de vero en sia maniero, kaj *viaj* erudiciuloj en okcidento *eraras*, se ili kun solena respekto admiras la profundecon de nia *pensado* kaj supozas, ke ties rezultoj estas *la fina atingebla kono de la vero*.—

Ne estas hazardo, ke ĉe vi en okcidento estiĝis homoj de tranĉile akra pensado, kiuj venis per sia pensado al tre similaj, aŭ eĉ al la *samaj* rezultoj kiel la pensuloj de *nia* lando.

En la ludo de ŝako, nenombreblaj kombinaĵoj de figuretoj sur la tabulo estas eblaj, kaj tamen la rando de la tabulo kiel ludejo neniam estas transpaŝata; tiel same, ankaŭ ĉiuj rezultoj atingeblaj per pensado ĉiam restas subigitaj al la leĝoj de pensado kaj neniam povas forlasi sian ludejon.

Sed tio, kion oni *deziras* trovi per pensado, estas tre *malproksima* de tiu ludejo; ĝi certe povas *fariĝi objekto* de pensado, *post kiam* oni *trovis* ĝin, sed neniam estas *trovebla* per pensado...“

Post malgranda paŭzo, kiun la majstro uzis por doni al mia akompanantino – virino sperta en multaj fakoj de scio kaj originanta el malnova familio de erudiciuloj – kelkajn informojn pri la diferencoj inter la orienta kaj okcidenta manieroj de instruado kaj lernado, li plue diris:

„Por malkovri la ‚*ŝtonon de la saĝuloj*‘ – ‚*la veron*‘ – la praprofundan sekreton de ĉiuj sekretoj – *tion prafontantan, trankvilon donantan, tion, kio kvietigas ĉiun sopiradon*, – oni ne bezonas scii, ke la tero rivoluas ĉirkaŭ la suno, ke la steloj de la nokto estas ne lumoj sur la kupolo de l’ ĉielo, sed astroj, la kaŭzon de fulmo kaj tondro, nek multajn aliajn aferojn, kiujn eltrovis la homa *intelekt*o .

Ĉio tio estas plene indiferenta por la spertado de *tio pra-funda*. –

La suno povus ĉiutage rivolui ĉirkaŭ la tero, fulmo kaj tondro povus esti esprimoj de demonaj potencoj, kaj la steloj povus esti malgrandaj lumiloj ĉiuvespere ekflamigataj de aeraj spiritoj super niaj kapoj.

Ĉio ĉi estas rigardenda kiel tute *neesenca*, kiam temas pri la fina ekkono de la vero, pri la spertado de *tio eterna*...

Iu ajn *fikcio* por klarigi tiujn fenomenojn servus al la homo *same*, kiel la *plej certa* scio pri iliaj naturaj kaŭzoj, konfirmebla per plej diversaj komplikaj instrumentoj.

Ni bedaŭras, ke la homa volo strebas en direkton, kiu aperigas tian scion al la homo tiom enorme *valora*, ĉar ĝi pli kaj pli malfaciligas al li la vojon al la spirito. — —

Rezulte de tiu scio li *perdas mondon de sentoj*, en kiu li restu *hejme*.

Per siaj instrumentoj li kreas al si gigantajn organojn de pensa ekkonado, kiuj tute ne estas en harmonia rilato al lia nature donita *ekkonkapablo*, kaj li *mensogas al si mem*, se li kredas, ke tiuj *intelektaj ekkonoj*, kiuj jam de longe ne plu konformas al liaj realaj *ebloj de agado*, alproksimigas lin eĉ je la dikeco de haro al la vero, kiun *finfine* li serĉas...

Kion li tiel atingas, estas nur la konscio de lia senpoveco rilate la potencon al li donitan, nur

sento de *malharmonio* inter ‚*scio*‘ kaj *povo atingi*.

Tiu sento de senpoveco forlogas lin al tio, ke li estimas malalte la potencon, kiu estas donita al li *reale*, sed en pure *spirita* maniero, dum li samtempe rigardas fiere siajn ‚inventajojn‘, sen konsciiĝi, ke estas *ili*, kiuj rabas al li *tion plej bonan*, ĉar ili tenas la strebadon de lia *volo* en direkto *kontraŭa al la vera fina celo*...

Li perdas la senson por la *relativeco* de ĉio en la *ekstera mondo*, perdas la senson por tio, ke la ‚leĝoj‘ de la naturo, kiun li kredas ekkoni, – eĉ se li ekkonis ilin *ĝuste*, – havas nur *kondiĉan* validecon, kaj ke *la forto de la spirito* povas *ŝanĝi*, kvankam ne la ‚leĝojn‘, sed ja la *kondiĉojn* de la ekstera mondo...

*Tio eterna*, kion li per sia tuta penado propre *deziras* lerni ekkoni pli kaj pli klare, restas *daŭre malproksima* de li, tiom longe, ke li ne *inversigas* la *direkton* de sia serĉado. – – –

Jam morgaŭ la tuta mondo de nemezurebla spaco povus dispolviĝi, nova universo kun tute *alia* kondiĉaro povus plenigi la spacojn, ‚naturaj

leĝoj‘ povus efektiviĝi, pri kiuj via tuta ,scienco‘ *suspektas absolute nenion*, kaj tamen estus *nenia ŝanĝiĝo* en la eterna spirito, kiun oni povas ekkoni nur per *spertado*. — —

*Vanta* kaj *efemera* estas ĉiu ,scio‘, kiun vi penas atingi en la *ekstera mondo*, — *vanta* kaj *efemera* estas ĉiu laŭsupoza ,ekkono‘, kiu ankoraŭ bezonas la apogilojn de filozofianta *pensado*, — sed la ekkono de la *esenca spirito* per *spertado* faras el la plej malklera almozulo — kiu scias nenion pri tio, kion vi nomas ,kulturo‘ kaj ,progreso‘, sidas en sia arbara kabano, kaj vivas de la donoj de pilgrimantoj, kiuj devas tramigri la ĝangalon — *eternan reĝon de ĉiuj mondoj, majstron de ĉia vivo*. — — — —

Certe, vi *ne iru*, kiel tia *jogano*, en la *praarbaron*; certe estas dezirinde, ke la disĉiplo de saĝo, kiu vivas en okcidento, havu tiom de la ekstera scio de sia tempo, ke li scias *paroli* kun siaj samlandanoj en la *lingvaĵo* de sia tempo; sed la kono de la *ekstera* scio ne devas bari al li la vojon, kiu per *spertado* kondukas lin al scio

*spirita*, – ne devas fariĝi al li *katen*o, kiu malhelpas lian paŝadon. – –

Nur kiam li *superis* sian *eksteran* scion, li povas vere esperi trovi en si la *certan* ,scion‘ per *spertado de la spirito*. – – – –“

## LUMO KAJ OMBRO

Tiutempe mi demandis la altan majstron, ĉu estas vere, ke – kiel oni diris al mi – ekzistas homoj sur tiu ĉi tero, al kiuj malkaŝiĝis finaj sekretoj kaj kiuj posedas spiritan potencon, sed kiuj uzas sian potencon nur por kaŭzi *damaĝon* al la homaro. –

Kaj la honorindulo diris:

„Kiu estis akceptata en la altan unuiĝon de la *lumantoj*, tiun la leĝo devoligas, ke li *lumu* al si mem kaj al aliuloj *kiel suno de la senfina spaco*.

Se li volus plue prunti al si lumon de *aliuloj*, kiel *disĉiplo* ankoraŭ rajte faras, tiam li neeviteble devus perdi la altajn, kreantajn fortojn, kiuj estis transdonataj al li...

Por li, kiu fariĝis ‚vidanta okulo de la mondoj‘, ne plu devas ekzisti iu *konfuziĝo*, ĉar li portas en si potencon, kiu postulas, ke li *respondecu pri ĉiu momento*, kiun li travivas. – – –

Li devas lerni paroli kun reĝoj kaj almozuloj, kvazaŭ li estus de *ilia speco*, kaj li devas vidi en ĉiu homo *nur la homon*, devas *povi forgesi* hie-

rarkian pozicion kaj rangon, meriton kaj kulpon, kronon kaj almozulan veston. –

Li *neniam* restos staranta blindigite antaŭ iu homa potenco, ĉar ĉiu potenco, kiu povas renkonti lin, havas en si mem sian *finon*, sed *tiu* potenco, kiun *li* konsciavole portas en si kaj al kiu li *servas*, kvankam li povas ordoni al ĝi kaj *devas direkti* ĝin laŭ sia volo, estas en si mem *senfina*. – – –

Kiom ajn li eble sentas sin *ligita* al tio terhoma, li tamen en ĉiu momento estas ankaŭ *libera* de ĝi, ĉar lia animo fariĝis ‚regno de la eterneco‘. –

*Nenio* krom *li mem* povas igi lin perdi la kronon kaj sceptron de tiu regno...

Nur *li mem* povas pereigi sin per *propra kulpo!*

Sed kvankam li povas tiumaniere ‚*fali*‘, li tamen restas, eĉ *post* la falo, ligita al tiu potenco, kies *portanto* li fariĝis...

Li tiam apartenas al tiuj fortoj de *detruado*, kiuj en la maro de psika ekzisto estas same necesaj, kiel ŝtormo kaj interna turbulado por la tera maro.

Li tiam fariĝas *malamiko* tie, kie li estis *amiko* kaj *frato*, kaj la alta unuiĝo funebras pro *stelo*, kiu propravole lasis sin fali *en la eternan abismon de kaosa dissolviĝo*...

En plej profunda tenebro, sen la forto relevi sin, li ankoraŭ vivas nur por sia *volo de neniiĝado*, ĝis li mem iam subfalas al sia propra volo, kaj sekve disfalas en miriadojn da energiatomoj, kiuj, fariĝinte liberaj fortocentroj, denove komencas la migradon de la vivo.

La *sama* potenco efikas en la *lumanto* kaj en lia kontraŭpoluso, la *estro de la mallumo*, kaj tiu ĉi reganto de la *abismo*, plena de neniiga volo, *posedas* sian potencon nur pro tio, ke li iam ricevis ĝin kiel *lumanto*. — — —

Per sia *falo* el la *lumado* li fariĝis unu el la *fratoj de la ombro*.

Tio estas la vero en tio, kion oni rakontis al vi, kaj ankaŭ *en la landoj de okcidento* ekzistas sennombraj homoj, kiuj *ne suspektas*, ke ili estas nur *marionetoj de tiuj grandaj neniigantoj*, tute doninte sin al ties granda spirita influo.—“

## LA POTENCO DE LA SPIRITO

Ree mi demandis la altan saĝulon, kiu tiutempe transdonis al mi sian scion, antaŭ ol mi povis mem fariĝi „spirita scio“, ĉu ne tamen iu saĝo, iu alta kapablo povas esti lernata el malnovaj libroj, tenataj en sekreto de ‚sciantoj‘, kaj li respondis al mi:

„Pli multe vi ĝoju pri ĉiu *plej eta saĝo*, kiun *via spirito* donas al vi, ol pri ĉiuj *ŝargoj da ‚lernita‘ scio!* –

Pli multe vi ĝoju pri ĉiu *plej eta sukceso*, kiun *via spirito* donacas al vi, ol pri ĉiuj *lernitaj kono kaj lerteco* de la tero! –

Vi ne volu havi ion komunan kun tiuj, kiuj devas esti ‚*lerninta*‘ ĉion, por ĝin povi! – –

Vi ne volu havi ion komunan kun tiuj, kiuj devas esti ‚*aŭdinta*‘ aŭ ‚*leginta*‘ ĉion, por ĝin scii!

Via spirito ĉiam estu *libera* kaj povu provi siajn *fortojn* en libereco!

Via spirito ĉiutempe estu *sinjoro kaj majstro de ĉiuj viaj animofortoj kaj unuigu* ilin sub *sia* regado! — — —

Vere, via *animo* havas profundajn fortojn, kiujn ankoraŭ *neniu plene esploris* en si, kaj ankaŭ via *korpo* havas multajn *sekretajn kapablojn*, kiujn ankoraŭ *neniu* en si *plene ekkonis!*

Mi volas *malligi kaj vivi* vian korpon, kaj fari la elementojn de via *animo* viaj *ĉiam pretaj servantoj!*

La *saĝo*, kion vi akiras, ne originu el *libroj*, kaj vi ne pruntu vian *povon* de *aliuloj!* — — —

Vi *mem* havas *en vi vian plej artoriĉan kaj lertan instruiston*, kaj la tuta *saĝo* enskribita en *libroj* estas *nur malgrandaĵo* kompare kun *tio*, kion via *animo* portas en *si mem!* —“

## LA JUVELO DE LA KORO

Aliafoje la parolo estis pri tio, *kiel la spertado de la surtera vivo* estas juĝata, se oni rigardas ĝin en la *lumo* de la spirito, kaj la altulo ekparolis:

„Vi *tajlu* vian spertadon, kiel oni tajlas *diamanton*, – *en ĝia propra polvo!* ...

Vi *,muntu‘* vian spertadon, – kiel oni muntas altvaloran gemon! – –

Via tuta spertado estu tajlata tiel, ke ĝi havas *klarajn facetojn*, por ke ĝi reflektu la lumon de la ĉielo kvazaŭ en geometrie regulaj formoj. –

Kvazau oraĵisto, vi zorgeme kreu la *,oran ringon‘*, kiu fariĝos la inda *,munto‘* por via *,tajlita‘ spertado!*

*Vi mem* estas via *spertado!*

*Vi mem* estas la *,munto‘!*

*Vi mem* estas la *gemotajlisto* kaj la *forĝisto* de via *vivoringo!* –

Kion vi tiel *kreos*, – tion *donacu* al *tio senfina!*

*Vin mem donacu al tio senfina, kiel juvelan  
ornamaĵon! ...*

*En ĝia trezorejo vi estos sekura kaj ŝirmata.—*

*Kiel juvelo de la koro via spertado eterne  
brilos en la lumo de la eterneco! —“*

## TRANSIRO

Aliafoje, dum la tempo, en kiu mi ankoraŭ estis ĉelao de mia saĝa guro, li instruis min kaj diris:

„Jen la besto kun senfine multaj kapoj!

Vi ekiris por neniigi ĝin, sed ĉiu kapo, kiun vi debatis, elkreskis ĉiam denove, kaj minacas vin kiel antaŭe. — —

Kiu volas *mortigi* tiun ĉi beston, tiu ne devas verŝi ĝian *sangon*...

Zorgu, ke vi neniigu la beston per tio, ke vi ŝajnas *sekvi* ĝin!

Estu *bona* al la besto, — — ĉar de tio ĝi fine *devas* pere! —“

Kaj mi faris tion konsilitan al mi, kvankam la konsilo tiutempe ŝajnis al mi sensenca...

Longe mi devis esti „bona“ al la besto, antaŭ ol ĝi komprenis: — „jen estas iu, kiu *ne timas* min. —“

Ree kaj ree ĝi provis *teruri* min, kaj ĝi *vere kapablis* esti „terura“. — — —

Sed fine venis la tago, en kiu *la lastan fojon* mi devis esti „bona“ al ĝi, – pli ol iam antaŭe, – kaj la besto lace kuŝiĝis sur sia flanko, kaj – mortis.

La ondoj de pramonda maro forlavis ĝian kadavron.

En tiu tago mia animo sentis, ke ĝi estis *liberiginta* de ĉiu servodevo.

Nun mi ŝvebis *super* mia korpo, kaj ankaŭ povis laŭvole *kaŝi* min en ĝi kvazaŭ heliko en sia konko. –

Nun mi estis *mastro* tie, kie mi antaŭe estis *sklavo*.

Kaj venis al mi *la voĉo de la leĝo* kaj diris:

„Ĉar vi *malligis* tion, kio en via gento estis *ligita* ekde la komenco de la tero, vi estonte povos *ligi* kaj *malligi* tion, kio apartenas al via gento!“

Do en tiu tempo doniĝis al mi *la forto por agi* kiel estro de nevidebla armeo...

En tiu tago miaj altaj fratoj parolis:

„Al la okcidento naskiĝis nova instruanto! La steloj de la okcidento ankoraŭ ne estingiĝis. –“

En tiu tago doniĝis al mi la alta devo, nun *mem instrui* en interparoloj kaj per paraboloj tion, kio *povas* esti instruata, kaj mi komencis formi propravorte tion, kion la spirito de la eterneco nun lasis min percepti en *senvorta vidado*, kaj kio iam fariĝis al mi *sperto* sur mia vojo al la spirito, kiom estis *permesate* al mi komuniki ĝin.

Nun estis mia tasko, konduki *aliulojn al ili mem*, ĉar en mi mem mi estis fariĝinta „*scio certa*“. — — —

Mi donas, kion mi *havas por doni*, kaj en la *maniero*, en kiu mi *kapablas* doni.

Mi *ne uzas iun vorton* en miaj libroj, kio ne estu konsiderata kun ĉia atento.

Eble leviĝas iuloke *demando*, kiu trovas sian *respondon* en *alia* loko, sed oni atentu, ke en tiuj ĉi aferoj ekzistas firma *limo* de permesataj respondoj, kiu devas *neniam* esti *transpaŝata*.

## LA INTERPAROLO PRI LA PLEJ INTERNA ORIENTO

Saĝulo iam estis demandata de liaj disĉiploj pri la „saĝaj viroj de la oriento“, kaj li respondis:

„Serĉu la ‚plej internan orienton‘ *en vi mem!*

Kiam *vi mem* vivas en la ‚plej interna oriento‘, vi renkontos la ‚saĝajn virojn de la oriento‘, — sed ne pli frue! —

Kiu *en si* malfermas la ‚orienton‘, tiu akiris ‚regon‘, kiu estas pli granda ol ĉiuj regnoj de la tero. — — —

Dio, la pardonema — lia nomo estu laŭdata — similas al *SHAH-AN-SHAH*, ‚ŝaho de ŝahoj‘, kiu regas super ĉiuj reĝolandoj de la tero.

En justeco kaj amo li starigas reĝojn super la landoj de la spirita mondo kaj donas al ili potencon kaj saĝon, por ke ili povu administri tion al ili konfiditan, sed tamen ĉiuj landoj restas sole *lia* propraĵo.

En la plej interna koro, en vi mem, estas *antaŭcambro*, malgranda kiel semero de sinapo, kaj en ĝi estas malgranda *pordo*, pli malgranda ol la plej eta polvo videbligita de sunradio.

Tra tiu ĉi pordo devas ŝovi sin tiu, kiu volas atingi ,la plej internan orienton‘! –

Trapasinte, li trovos malantaŭ la pordo vastajn landojn, – eternan ,teron‘ – ,Hindujon‘ de ĉiuj Hindujoj – ,montaron‘ de ĉiuj montaroj...

Sian regnon li tie trovos fondita antaŭ eterneco.

Sed antaŭ ol li povas atingi sian regnon, kiu en tiuj landoj estos donata al li de tiu SHAH-AN-SHAH, kiu tie regas de eterne ĝis eterne, li devas atingi la *sanktan riveron*, kiu fluas en eterna ciklo ĉirkaŭ la plejinterno de la lando, rivero, kiu havas nek fonton nek defluejon, – konstante sin mem estigas kaj sin mem englutas...

Tie li trovos la ,pramiston‘, kaj la pramisto demandos lin pri lia ,*nomo*‘. –

Se li tie ĉi ne konas sian ,*nomon*‘, li nepre devas tuj reiri al la ekstera tero.

Sed se li povas respondi al la pramisto, tiu ĉi *transveturigos* lin al la *alia* flanko de la rivero, kie li tiam estas en – la ‚plej interna oriento‘. –

Tie li trovos la gvidanton, kiu kondukos lin al la ‚granda montaro‘ en la ‚plej interna oriento‘.

Tie, meze de eterne neĝkovritaj montoj, li subite trovos *eterne verdaj herbejoj plenaj de floroj*, tiel ke li apenaŭ povos kredi al siaj okuloj.

Tie li ekvidos la kupolojn de altega *templo*, kaj kiam li finfine atingas ĝin kaj estas enlasata, li vidos en tiu templo la ‚*saĝajn virojn de la oriento*‘, kiujn li ĝis tiam serĉis *vane*.“ – – – – –

Sed kiam la demandintoj plue demandis, ĉu estas nepre necese *trovi* la ‚saĝajn virojn de la oriento‘, se la animo volas iam akiri sian spiritan regnon, la saĝulo diris:

„Vi ankoraŭ ne scias, *kion* vi demandas!

Kiu volas trovi la regnon de sia animo, tiu devas esti *helpata de interne*. –

Sed *helpi* povas nur *tiuj malmultaj*, kiuj vivas en la ‚plej interna oriento‘, kaj kiujn la Pardona provizis per la *potenco doni lumon* al iliaj ‚fratoj en la mallumo‘, tuj kiam ilia *volo* kaj ne

nur ilia ‚dezirado‘ serioze sopiras ricevi tian lumon. — —

Vi do devas trovi la ‚saĝajn virojn de la oriento‘ en vi, se vi volas iam atingi la *regon*, kiu estas en vi! — — — — —“

## LA INTERPAROLO PRI LA FORPASO DE PERFEKTIĜINTO

„Kio okazas,“ demandis disĉiplo la majstron, „kiam unu el la alta unuiĝo *forpasas el tiu ĉi tera vivo?* – Ĉu li tiam malaperas en la senfina oceano de spirita lumo, estante ankoraŭ konscia en la lumo nur pri *si mem?* – Ĉu li vivas en alta unuiĝo, estante ligita *kun siaj altaj ‚fratoj‘ nur per sia spirito?* – Aŭ ĉu li plue estas iumaniere *proksima al la tero?*“

La majstro respondis:

„Kiam la sanktoleito vidas la tagojn de sia ligiteco al la tera vesto finiĝi, tiam li transdonas *sin mem*, kaj la *forton*, al kiu li ŝuldas la brilegon de la unueco, al *tiu alia* en la ĉeno, kiu *ekflamigis sian homecon je la suno*, por ke li iam fariĝu la *postvenanto* de la sanktoleito en la vivo de la homaro de sia tempo.

Ĝis tiam la *alia* ankoraŭ estis la *disĉiplo* de l' sanktoleito, eĉ se li jam longe estis *majstro* inter la majstroj de la sep pordoj...

Nun la forpasanto diras al li:

,Hodiaŭ mi volas fari vin *vojo*, ĉar mi mem estis ,vojo‘ kaj nun transpaŝis min mem.

Ekde nun du estas *unu*, kaj el du fariĝas la tria, – en tio kaŝiĝas la sekreto, en kiu *vi* nun estas unuigata kun *mi!* – – –

Ĉiam turniĝas la *kapo de Jano!*

La *maljunulo* cedas al la *junulo*, kaj la *junulo* devas fariĝi la *maljunulo*. – – –

Sed la du naskas el si la *trian*, – tiun *unu*, kiu ĉiam restas en ekzisto, kaj *devas* ekzisti, kie ajn estas ,ekzisto‘ ...

Kio fluas tra la ĉeno, tio donas *vivon* al la *maljunulo*, al la *junulo*, kaj al *tiu*, kiun la du estigas el si! –

Estante tiel enmetita en la ĉenon tra ĉiuj venontaj tempoj, *vi* nun disradiu la *lumon*, kiu lumas en ni *ambaŭ!* –

Tiun ĉi teran veston mi nun demetas.

Kion ĝi kaŝis, tion mi metas en *vian* manon!

*Min mem* mi nun kaŝas en *vi*, ĉar mi apartenas al *tiuj*, kiuj helpante *restas* ĉe la homoj de tiu ĉi tero, kaj *vi* apartenas al ni *samamaniere!*

Neniam ni povas forlasi la teron, nek en *tiu ĉi* nek en *venonta* kosma eono, antaŭ ol la *lasta* el la homoj eniris en la lumon!

Ekzistas *sur la tero* neniu mistero, kiu egalas al *tiu ĉi!* – –‘

Tiel la spirito de la sanktoleito eniras en tiun, kiu antaŭe estis lia disĉiplo, kaj la du estas nun *unu ...*“

## LA FLOROĜARDENO

„Tie ĉi, kie vi vidas abundon da *floroj*, antaŭ malmultaj jaroj estis malplena *dezertejo*.

*Trudherboj* kreskegis en densaj staŭdoj, kie hodiaŭ staras *rozoj*, kaj ĉiaj malutilaj bestetoj tie ĉi vivis en sia paradizo.

Narcisa aromo elfluas nun el tiu sama tero, kie antaŭ mallonga tempo ŝosis malbonodoraj kreskaĵoj. –

Kaj ĉion ĉi kreskigas la *sama* suno el la *sama* grundo! – –“

Tiel parolis la ĝardenisto ...

Sed mi volas montri al vi alian ĝardenon, en kiu *vi mem* estas la ĝardenisto. –

Vi ankoraŭ ne povas diri pri *via* ĝardeno la *samon* kiel tiu ĝardenisto pri *sia*.

Matene kaj vespere vi eltiras *trudherbojn* kaj nun atendas *viajn florojn*, – tamen *trudherboj* elkreskas *ĉiam denove*.

Nun vi kverelas kun *via „Dio“*, kiun *vi mem inventis al vi*, kaj volas ricevi de *li* la fruktojn de *via* penado, anstataŭ ke *vi mem semus* kaj tiuce-

le petus florsemon, tie en la ĝardenoj, en kiuj fruktoj jam *maturiĝis* ...

La „*Dio*“, al kiu vi vokas, estas nur la ombro de via timoplena koro! — — —

*Ne* atendu de *li*, ke li iam *rekompencu* vin por via penado! — —

Ne pli frue vi vidos en via „ĝardeno“ vian *vi-vantan Dion, la veran, solan Dion*, kiun via *animo* sopiras, ol kiam la *semo* elkreskis, kiun vi petis en la florigardenoj de la pli aĝaj ĝardenistoj. — —

Vidu, la *tuta homa ekzisto* propradire estas nur „dezerta“ grundo, kiu tamen atendas la „ĝardenistojn“, por ke ili kreu el ĝi „florigardenon“. — — —

La *sama* „grundo“ kaj la *sama* „suno“ tiam kreskigos nur „*florojn*“, kie nun radikas „*trudherboj*“ ...

Vi metis al vi *altajn* celojn. —

Vi strebas al ĉio, kio povas *levi* vin. — —

Sed ĝis nun vi neglektis *tion* ĉi: —

Ke nenio povas *kreski* al vi, kie *vi mem* ne enmetis *semon* ...

Sed la „semon“ vi devas peti de *aliaj*, – de *tiuj*, kies florbedoj jam *maturiĝis*. – –

Ili volonte donas al vi semon de siaj florpantoj, – sed vi ankoraŭ ne kredas, ke el tiuj nerimarkindaj grajnoj iam povus fariĝi *floroj*. –

Malzorge do vi forĵetas la ricevitan semon, kaj aliaj migrantoj poste trovos *je la rando de l' vojo* strangajn, brilajn *florojn*, dum *via ĝardeno* kiel antaŭe ĉiam produktas nur *trudherbojn*. –

Sed se vi *fakte metis* la semon *en la grundon*, vi fosante *malfermas* la grundon ĉiutage denove, por ke vi povu havigi respondon al via *du-bado*, ĉu la florsemo, kiun oni donis al vi, vere povas *ĝermi* ...

Sed tiel vi *neniam* ricevos florojn!

Ĉio *kreskanta bezonas trankvilon kaj profundan kaŝitecon*.

Se vi nun fine volas vidi vian ĝardenon floranta, vi devas vere *fari tion*, kio estas *necesa*. –

Iru al la pli aĝaj ĝardenistoj, kiuj *havas* maturan florsemon, petu ĝin de ili, kaj plej zorge kolektu, kion oni donos al vi!

Tiam disĵetu la semon sur la bone senplantigitan teron, kaj lasu la grundon kaj sunon kreskigi la ĝermojn kaj florojn! –

Ne faru al vi zorgojn, se ankoraŭ kelkaj *trudherboj* eble leviĝas inter la florplantoj!

Kiam viaj floroj estos plene *florantaj*, vi povos facile *forigi* la trudherbojn. – – –

*Via vivanta, eterna Dio* paŝados en via ĝardeno *ne pli frue*, ol kiam ĉiuj viaj bedoj estas en *florado* ...

Vi ne volu florigi ilin per *artaj* rimedoj!

Vi devas nur senplantigi la grundon kaj enmeti semon. – –

Ĉion ceteran vi devas lasi al la *tero* kaj *suno*.  
Ankaŭ *vian* teron *la suno superradios!*

En via ĝardeno, mia amiko, se vi zorge semis kaj antaŭe bone senplantigis la teron, iam estos naskata al vi *sur via propra tero* via *vivanta Dio!* – –

La bonodoroj de viaj florbedoj servos al li kiel nutro ...

En sankta kvieto li pli kaj pli montros sian altan formon ...

*En via propria ĝardeno, kiam ĉio staras en florado, vi iam paŝados kun via Dio. — — —*

## LA MALBONAJ DISĈIPLOJ

*Majstro* vivis en granda urbo, kies haveno altiris ŝipojn el ĉiuj landoj, tiel ke li baldaŭ vidis ĉirkaŭ si multajn disĉiplojn.

Inter ili estis kelkaj, kiuj tre zorgeme *kolektis* liajn vortojn.

Post pluraj jaroj ili „*sciis*“ preskaŭ ĉiujn liajn vortojn, kaj ili apenaŭ memoris, ke ne temis pri *iliaj propraj* vortoj ...

Ili estis rigardataj kiel *saĝaj* en la urbo kaj malproksime en ĉiuj landoj, kaj oni demandis *ilin*, kiam oni volis ekscii la opinion de la majstro. —

Aliaj disĉiploj aŭdis liajn vortojn kun malferma koro, sed *liaj paroloj ne fiksiĝis* en ilia *memoro*.

Tamen ilia *vivo* formiĝis laŭ la instruo de la majstro, kaj ne ekzistis iu okazado ĉirkaŭ ili, kiun ili ne vidis kvazaŭ *tra la okuloj de l' majstro*.

Ankoraŭ aliaj entuziasme aŭskultis la vortojn de l' majstro kaj enigis ilin profunde en sian *animon*, tiel ke ankaŭ ili vivis laŭ la *instruo* de l' majstro, sed laŭ la maniero de *sua* animo, kaj ili sciis vidi per *siaj* okuloj ne *kiel la majstro vidis*, sed tiel, kiel li *volis*, ke oni vidu la aferojn ...

Post kelka tempo, el ilia animo leviĝis *propra, nova* ekkonado.

Ilia *propra* ekkonado *batalis* kun la instruo de la majstro kaj ĉiam pli fortiĝis en tiu batalo, ĝis fine ĝi *venkis* ...

La *propra ekkonado* nun instruis al ili interpreti la vortojn de l' majstro *aliamaniere*, ol ili iam estis interpretitaj.

En la urbo de l' majstro oni tial diris:

„Jen *malbonaj disĉiploj!* Ili *ne povas kompreni* la instruon de la honorindulo, kaj tial lia saĝo fremdiĝis al ili! –

Kiom bedaŭrinde, ke li trovis tiajn aŭskultantojn sen aŭdkapablo, tiajn adorantojn sen respekto! –“

Iun tagon venis viroj de foraj maroj, kiuj volis serĉi en la urbo de la majstro spurojn de lia saĝo, ĉar la majstro mem jam antaŭ longe mortis.

Ili serĉadis tie kaj tie ĉi, sed neniu povis montri al ili la saĝon, kiun ili volis trovi.

Fine ili venis al tiuj nomataj la „malbonaj disĉiploj“ de la majstro en lia urbo, kaj tuj ekflamiĝis ilia koro, ĉar ili vidis, ke nur tie ĉi la saĝo de la majstro estis plene *ekkaptita*, sed ke lia *instruo* estis naskinta *pli grandan* instruon, kiu entenis ĉion, pri kio la instruo de l' majstro ankoraŭ silentis.

Pliriĉigite en sia plej profunda interno kaj feliĉigite en sia animo, ili reveturis al la foraj maroj de siaj hejmlandoj kaj tie diskonigis ĉiuloke la novan instruon, kiu *entenis* la saĝon de l' majstro en nova *formo*. –

Nur post longa tempo la homoj en la urbo de la majstro aŭdis, ke tiu instruo de la „malbonaj disĉiploj“ estas rigardata trans foraj maroj jam kiel saĝo, kiu *sola* entenas la plej altan saĝon de la *majstro*.

Ili tre miris, kaj, interkonsiliĝinte, ili diris:

„Ni venigu el tiu malproksima regiono *instruanton*, kiun ni povas *fidi*, ĉar kiu scias, kiu instruo estas rigardata tie kiel la instruo de la „malbonaj disĉiploj“!“

Kaj ili sendis ŝipon al la fora regiono, por ke ĝi venigu al ili instruanton.

Sed kiam la senditoj aperis tie, ĉiu instruanto de la nova saĝo *rifuzis* sekvi ilin, kaj oni diris al ili: „*Vi mem* havas viajn altajn majstrojn, kaj nur ĉe ili ni *trovis* la saĝon, kiun ni tie ĉi instruas. – Kial ni *alportu* al vi, kion via urbo al ni *donis*?! – Kiel ni povus *kuraĝi* instrui, estante nur *disĉiploj* de viaj majstroj, kiuj elfinis la instruon de *sia* granda majstro?! –“

Sed ĉar la senditoj ne volis iri hejmen sen sukcese, ili serĉis tiom longe, ĝis ili trovis iun, kiu pretis iri kun ili kiel instruanto, ĉar ili promesis al li altan rekompencon.

Sed temis pri instruanto, kiu estis kompreninta la novan instruon *nur duone* kaj tial havis nenian reputacion ĉe la *veraj* instruantoj.

Kiam tiu ĉi venis en la urbon de la majstro kaj komencis instrui, ĉiuj atente aŭskultis lin, ĝojante, ke oni havis en sia mezo tiom „grandan

instruanton“, – tiom pli, ĉar tio, kion li instruis, *treege diferencis* de la instruo de la „malbonaj disĉiploj“. –

Kaj la popolo diris:

„Kiom malsaĝaj estis la homoj, kiuj venis de malproksime por akiri de la „malbonaj disĉiploj“ la saĝon de la majstro!

Nur nun ni povas kompreni la majstron!

Nur tiu granda instruanto el fora lando vere peris al ni lian saĝon.

Vere, nur *li sola* indas esti la granda posteulo de l’ granda majstro, kiu vivis inter ni! –“

Kaj je tiu opinio ili restis ...

## LA NOKTO DE PROVO

Estis en tiu tempo, kiam mi ankoraŭ estis *discípulo* de mia alta guro.

Estis en tiu tempo, kiam mi unue devis pruvi, ke mi povis *fariĝi „frato“* de mia majstro ...

El profunda, sensona fundo eliĝis la nokto.

Kuntiriĝis la valoj, kaj la montoj plialtiĝis kvazaŭ por rezisti.

Resonegante, el plej alta, maldensa aero malleviĝis aglo kun pezaj flugilmovoj.

Tiam fariĝis ĉirkaŭ mi *kvieta*, kiu igis la sangon en miaj vejnoj muĝi kiel riverego.

Mia spirito estis tiom plena de *melankolio*, ke eĉ torentoj da pluvo de tristeco ne povus plenigi ĝin plialtnivele ...

Senmove, kvazaŭ vualita hostio en Sankta Vendredo, la luno leviĝis rigide el doloroplenaj nuboj.

Mia korpo tremis en ĉiuj fibroj kaj sentis sin proksima al neniigo, sekve de la pruvoj antaŭe trapasitaj ...

Ŝajnis nun, ke io *monstra*, nevidebla volis *premsufoki* ĝin. –

Jen subite mia okulo fariĝis „*vidanta*“ en *nova maniero*, kaj ĝi vidis estaĵojn de putrantaj mondoj, – estaĵojn, kiuj ne povis suferi je sia abomeneco, ĉar ili opiniis sin, kiel mi sentis, eksterordinare *belaj* en sia nepriskribebla malbeleco ...

Hororo kaj terurego eliĝis el ili, kaj mia rigardo entiris miriadojn da venenaj sagoj en mian koron, kiam ĝi devis renkonti iliajn mukoplenajn rigardojn. –

Sed ili ĝojis pri sia abomeneco, kaj ĉiu nova vundo, el kiu mia sagotraborita koro komencis sangi, donis al ili hororan, dolĉan volupton. –

Mi volis malleviĝi en la teron pro interna turmento, aŭ doni mian karnon prefere al la lupoj ol subfali al tiuj monstroj, – sed la tero ne malfermiĝis al mi, kaj eĉ la lupoj fuĝis for de la loko de tia hororo ...

Mia animo treme ĝemis pro nedirebla sufero, kaj mia korpo tordiĝis kiel distretita vermo...

Jen la monstroj vidigis la grandajn, larĝ-eĝajn dentojn, kiuj elstaris el iliaj sangaj faŭkoj, kaj iliaj mukaj okuloj elĵetis verdajn fulmojn de veneno. –

Mi sentis, ke ili nun opiniis min sufiĉe malforta por fariĝi ilia *predo*, kaj ke ili *jam nun ĝojis* pri sia venko ...

Ĉar mi vidis *pereon* antaŭ mi, vekigis en mi *la forto de malespero*, kaj mi *ekrezistis*.

Mi ekprenis la demonon plej proksiman al mi – mia palpo ekhavis la impreson de malvarma, glueca substanco – kaj, kvankam preskaŭ venkinte de naŭzo, mi premis ĝian gorĝon ĝis la monstro lacigite cedis.

Jen la tuta aro, kiu ĉirkaŭis min, retiriĝis, kvazaŭ paralizite de teruro, tiel ke, venkinte *unu solan* el ili, mi estis venkinta *ĉiujn*.

Timoplene ili kaŭriĝis kaj penis foriĝi de miaj rigardoj.

Ju pli mi proksimiĝis al ili, des pli foren ili rapide retiriĝis de mi.

Sed kiam la luno paliĝis kaj juna tago leviĝis en oriento, ĉiuj ĉi abomenindaj estaĵoj arde in-

terkroĉiĝis, iom post iom leviĝis super la tero kaj forŝvebis kiel longa, malluma nubostrio.

Sed mi sentis, ke ili devis esti proksimaj al la morto kaj plu apenaŭ povis eskapi de pereco.

La suno leviĝis sange ruĝa super ardanta maro, kaj en ĝia radianta heleco la malluma nubostrio *diseriĝis* en orajn flokojn kaj fine dronis en orece blanka lumo.

Jen subite la majstro staris antaŭ mi, prezentis al mi la manon, ĝojoplene rigardis al mi en la okulon kaj diris:

„Mi ĝojas, ke mi ree povas saluti vin en la lumo de l' tago. – Mi suferis grandan zorgon pri vi, sed nun vi montris vin *mastro* al la *intermondo*; nun vi povas sendanĝere ĉiam eniri en ĝian regionon, kaj ĉiuj demonoj kuŝos obeeme je viaj piedoj! – –“

## INDIVIDUECO KAJ PERSONECO

Oni parolis pri la multaj diversaj formoj, sub kiuj la homo kredas ekkoni sian „mion“.

Fine oni petis instruon de la majstro.

Li parolis tiele:

„Kio estas necesa por *tiu*, kiu serĉas la vivon en la *eterno*, – *surtere*, *kiel en statoj postmortaj*, – tio estas ne la neado de lia *individueco*, sed la interna *neado*, la *neagnoskado* de la persono, sub kiu *la ekstera mondo kaj lia propra nesciado* – maskas lin. – –

Fariĝinte sendezira kiel *persono*, li tamen povas havi en si *dezirojn*, kiuj celas *pli foren*, – trans lian staton, – alten al pli pura altaĵo, kvankam la *deziroj* neniam povas *ekefiki* aliamaniere ol per tio, ke ili movas *voloforton* en la direkton de ili celatan.

Nur *tiaj* deziroj radikas en la vera *individueco*.

Sed la deziroj de la *persono* ĉiam esperas, ke estu *daŭranta* tio, kio devas *pasi*, kaj prenas kiel *veraĵon* tion, kio estas nur portempa *trompiĝo*. –

Plenumiĝante, ili *neniam* kondukas *pli alten* kaj nur *malhelpas* la liberan ascendadon ...

Kie io *persona* estas ankoraŭ dorlotata en imagado kaj dezirado, tie io *eterna*, tie *,individueco* ‘ ankoraŭ ne povas esprimiĝi.

Kiu kiel *persono* volas *konservi* sin mem, tiu devas voli, ke aliaĵo estu *neniigata*.

Ĉiam li renkontas *ekster* si ion alian, kio baras al li la vojon. –

Ankaŭ *individueco* volas nur *sin mem*, sed nur, por *en* si mem *konservi ĉion alian*. – – –

Ĉio kio estas, scias, ke *individueco* estas *unuigita* kun ĝi.

Individueco ne povas ami *sin mem*, *sen* ami en si mem ankaŭ *ĉion alian*. –

Neniam ĝi *malamos* ion personan.

Ĉar ĝi ekkonis ĝin kiel *nerealan* ...

Tio *persona* fariĝis al ĝi kvazaŭ la *,rolo*‘ de aktoro.

Ĝi povas taksi la valoron de la *,rolo*‘ laŭ la grado, en kiu ĝi lasas sian portanton, kiel *eternan individuecon*, esprimi sin.

,Individueco‘ ĉiam serĉos nur *tiujn* valorojn, kiuj kondukas al *altigo* kaj al *pli pura formado* de ĉio ekzistanta.

Kio ne servas al tio, estos al ĝi kvazaŭ ,*ne ekzistanta*‘. — —

*Eterna individueco* kaj daŭranta ,*mi*‘, estante unu en la alia, estas *unu*. —

,*Persono*‘ estas *io tre limigita*.

*Individueco* estas tempe kaj space *senfina*. —

Neniu ,individueco‘ povus iam *malhelpi* alian individuecon *disvolvi* sin mem.

*Ĉiu individueco havas sian senfinan regnon por si mem!*

Estante *unuigita* kun ĉiuj aliaj ,individuecoj‘, *trapenetrante* ĉiujn aliajn kaj *trapenetrante* de ili, ĝi spertas ĉiujn nur *en si mem*. — — —

Konstante elfluante el *tio sola estanta*, ĝi konstruas nur *sin mem*, kiel *unu* el la infinitoblaj formoj de *tio sola estanta*.

Tamen ĝi spertas ĉiujn *aliajn* de tiuj formoj *en si mem* kaj scias, ke ĝi estas *laŭforme identa* kun ĉiuj.

Nenio *ekster* ĝi povas iam fariĝi *obstaklo* por ĝi, kaj *nenio* povas *neniigi* ĝin, se ĝi restas *bazita en si mem*. — — — — —

## LA REGNO DE LA ANIMO

La *instruon pri la animo*, ekkonitan de la *lumantoj* jam en griza pratempo, mi volas tie ĉi sciigi al vi.

Tio ĉi estas la saĝo de tiuj malmultaj, kiuj *eĉ hodiaŭ* vivas en la lumo de tiu instruo. –

Homoj de la *okcidento* instruis *alian* instruon, kaj eĉ en *oriento* vi *nur malofte* renkontos tiun ĉi instruon de *tiuj vere sciantaj per memspertado* ...

Tamen kondukos vin en *eraron* ĉiu, kiu instruas *ion alian!* – – – –

Aŭskultu nun, kaj komprenu en via koro:

*Praeterna* estas la *spirito* de l' homo, sen komenco kaj sen fino. –

Eterne ĝi vivas en *propra*, esenca *lumo*, ĉar ĝi *mem estas lumo*, – lumanta *fajrero* de tiu *suno* eterne naskanta sin mem, kiu ĉiam ŝprucante eligas sian pluvon da fajreroj en la spacon. – – –

Ne nomu tiun „*sunon*“ „*Dio*“, ĉar Dio estas io alia!

Estos malfacile, komprenigi tion al vi.

Mi devas uzi vorton el la ĉiutaga mondo, por fariĝi komprenebla al vi, kaj tial mi diras:

„*Dio*“ estas la plej subtila *distilaĵo* de la spirito, *ne „la spirito“ konstante naskanta sin en sia ekflamiĝado!* – –

Sed *la eterna unuopa spirito de la homo* estas kvazaŭ *fajrero* de tiu eterne ŝprucanta *suno*, fajrero, en kiu la *distilaĵo de l' spirito* povas formiĝi, – en kiu la *vivanta Dio* povas infinitoble naski sin ...

Eterne naskas sin mem la eterne ŝprucanta prasuno de l' *eterna spirito!*

Eterne tiu turniĝanta suno ŝprucas siajn spirittajn fajrerojn kiel spirito-hierarkiojn en la spiritan „spacon“.

La „fajreroj“, kiujn ĝi *mem* ŝprucas el si, estas mem ankoraŭ *gigantaj sunoj*, sed tiuj ĉi siaflanke elŝprucas eterne „*fajrerojn*“, eterne „*sunojn*“, kiuj en sama maniero elŝprucas ĉiam

*pli malgrandajn kaj pli malfortajn „fajrerojn“  
aŭ fajreterosunojn ...*

Kio kaptis sin mem en la homa animalo de la tero: la *spirita fajrero*, per kiu la homa animalo *fariĝas* „homo“, tute ne estas la *plej malgranda* de tiuj fajreroj.

Vi povas *plej bone* helpi al via *komprenkapablo*, se vi imagas la „*grandecon*“ de tiu „fajrero“ proksimume en la *sama* rilato al pli grandaj kaj pli malgrandaj „*spiritaj fajreterosunoj*“, kiel en la rilato de tiu ĉi *terglobo* al *pli grandaj* aŭ *pli malgrandaj kosmaj korpoj*. — — —

Apartenis al la esenco de la spirita fajrero, kreinta al si sian malliberejon en la tera homa animalo, ke ĝi elektis al si la *regon de la animo* kiel sian kampon de agado, kaj ke ĝi fine, por fariĝi ankaŭ reganto en la regno de la *materio*, strebis al la posedo de „korpo“ en materia formo.

Sed tia „*korpo*“ jam estis *donita* al ĝi, korpo, kiu ja estis *ligita* kun la *materio*, sed *ne subigita* al ĝi. — — —

Ke la spirita fajrero, pro *timo* antaŭ la *materia* efiko de siaj fortoj, ligis sin kun la korpo de

la tera *homanimalo*, fine rezultigis, ke ĝia strebado fariĝis „falo“.

Vere temas pri „falo“, sed samtempe pri *mergiĝo* en la plej profundajn profundojn, en kiuj *nova konscio* povas naskiĝi. – –

Falante, la spirita fajrero *perdis la konscion pri si mem*, pri si mem kiel *suno* de la *eterna spirito*, sed la eterna forto, kiu *tamen restadas* en ĝi, igas lin strebi ree *alten al si mem*, tiel ke ĝi denove ekkonas sin mem post sia plena reveno, kaj tio en *gloro*, kiu povas esti vidata kaj sentata nur el la *profundo*, en kiun la fajrero estis falinta.

Prakomence ĉiu el tiuj pli malgrandaj spiritaj fajreroj, el tiuj malgrandaj „fajrerosunoj“, devas strebi al la *regno de la animo*, kaj nur la *impeteco* de ĝia strebado igas ĝin *rapidi trans* la celon, kiun ĝi volis nur *atingi*. –

Al la regno de la animo *devas iri* ĉiu el tiuj spiritaj fajreroj, se ĝi volas *formi sian mondon* kaj trovi sin mem en sia efikado.

*Antaŭe* ĝi scias nur pri si mem, nur pri sia pura *estado*. –

*Ne pli frue ol en la regno de la animo ĝi konsciiĝas pri siaj propraj agadaj fortoj. – –*

*Ne pli frue ol en la regno de la animo ĝi povas sopiri en si sian diecon, kaj nur en spirito sopiranta ricevi „Dion“ povas formiĝi la „distilaĵo“ de la spirito, povas ĝia vivanta „Dio“ „naski“ sin en la spirita fajrero. – – – –*

En tiu eterne turniĝanta „spirita suno“, kiu estas *konscia sole pri si mem* en sia nemezurebla grandeco, kaj kiu eterne ŝprucas siajn „fajrerosunojn“ en la spiritan spacon, – tie *ne* ekzistas *bezono* de „Dio“, ĉar tie *ĉio* estas nur *lumanta unueco de estado ...*

Por ke „Dio“ povu esti, devas ekzisti *io sentanta*, kio *ne* estas „Dio“, ne turniĝas nur *en si mem*, estante *en si mem* *sufiĉa* kaj *perfekta...*

Kiel *la blanka lumo de l' tago* estas disigebla en helajn kaj malhelajn *kolorojn*, tiel la *praeunueco de la spirito* devas kvazaŭ *disiĝi* en diversspecajn radiojn, se „Dio“ povu *naski* sin en la „spirito“ ...

Devas estiĝi *koloraj malhelaĵoj* en la *senkolora blanka* lumo de la spirito, por ke povas montriĝi la *ore blanka* lumo de la *Dieco*. — —

Por tio servas *la regno de la animo*.

Ĉiu homa spiritofajrero mergiĝas en tiun ĉi regnon, kaj ĉirkaŭ ĝi estiĝas, kiel kristaloj en salsaturita likvaĵo, la animaj *formoj*, kiujn via okcidenta instruo nomas: lia „*animo*“. — —

Tie ĉi en okcidento vi kredas, ke tiu „*animo*“ estas kvazaŭ fermita korpo el nevidebla, fluideca substanco, kaj via instruo diras, ke tiu anima organismo estiĝas en la momento de via surtera naskiĝo, ke ĝi neniam plu forlasas vin, kaj ke ĝi, kvankam estiĝinta en la tempo, konserviĝas eterne.

Sed via „*animo*“ tute ne estas tio senŝanĝa, en si fermita, ĉar la regno de la animo estas nevidebla, *fluideca maro*, en kiu ne ekzistas *neŝanĝeblaj* formoj, escepte de la nenombreblaj elementoj, kiujn oni povus nomi *animo-atomoj* kaj kiuj portempe *konsistigas* vian animon, *formas* ĝin el si; sed en ĉiu „*animo*“ estas *miroj* da ili, kaj *pli* ol *miroj* da *miroj*! — — — —

Tuj kiam tio, kio vi en la plej alta senco vere *estas*, nome tiu *eterna spiritofajrero*, atingas la regionon de la animo, tuj kiam ĝi *mergiĝas* en tiun fluidecan maron, – miliardoj da tiuj elementoj „kristaliĝas“ ĉirkaŭ ĝi kaj estas plenigataj per la lumo de la spirito.

Sed la spiritofajrero strebas pli kaj pli profunden, ĝis la *fundo* de tiu maro, kie renkontas ĝin la timigantaj fortoj, kiuj igas ĝin serĉi rifuĝon *en la ekstera regno de la plej densa materio*, tiel ke ĝi unuigas sin kun la *homanimalo* kaj perdiĝas en ties formo.

El patrino korpo ĝi nun naskiĝas kiel *homo de la tero*.

Sed ĝi konstante restas – eĉ sur la „fundo“ de la maro de l' animo, en sia vesto de karno kaj sango – ĉirkaŭita de la maro. –

Iom post iom ĝi lernas ekkoni – en la propra spirita lumo, kvankam tre malheligita – la formojn, kiuj kristaliĝas ĉirkaŭ ĝi.

Ne je la *unua fojo* tiuj ĉi elementoj estigis tiajn formojn!

Ili servis jam al *multaj* homaj spiritofajreroj en *pli frua* tempo, kaj ili ree kaj ree *malligos* sin kaj *denove* estigos similajn formojn, ĝis la impulso, kiu iam devigis ilin estigi formon, *estas plene efektivigata* de iu homa spiritofajrero, – ĝis iu homa spiritofajrero sukcesas unuigi *ĉiujn elementojn de tiu ĉi formaĵo* en sia *volo*.

Tiel okazas, ke vi trovas en via „animo“ sonojn, kiuj eksonis je la unua fojo ne en *via* tera vivo, – – kaj tio forlogis la popolojn de l’ oriento al la kredo, ke la homa spiritofajrero devas *multfoje* trapasi enkarniĝon en teranimala korpo. –

Sed estas *erara* tio, kion oni kredas en oriento, kaj kion ankaŭ en okcidento hodiaŭ tre multaj emas supozi.

Certe, en iuj okazoj kvazaŭ de „malsukceso“, homa spiritofajrero *dufoje* povas subiĝi al la impulso al tiu plej profunda falo, sed temas pri apartaj okazoj, kiuj estas tiom maloftaj, ke ili ne malvalidigas la regulon.

*Memmortigo* kaj *frua morto*, ankaŭ *troa enkrustiĝo en la densa animala korpo* povas estigi

tiun impulson al reenkarriĝo, sed ankaŭ tie ĉi nur en *apartaj* okazoj *ne tre oftaj*.

Vi eble retrovas en vi homojn de antikva tempo?

Se vi iam apartenas al tiuj vekiĝintaj en la spirito, vi povos eksonigi *tutajn vivojn* en vi, kaj tiu rememoro de viaj animoelementoj konsciĝas al vi, la homo *hodiaŭ* surtere vivanta, – sed *vi ne estis tiu*, kiun *vi hodiaŭ nove spertas* en vi! – – –

Vi nur portas en vi la *animajn formojn*, kiuj formiĝis en *lia* surtera vivo kaj ne trovis *en li* la *finan plenumiĝon* de la kreitaj *impulsoj*. –

Kion vi nomas via „*animo*“, tio estas *konstante ŝanĝiĝanta formaĵo* en la maro de animoelementoj, en la regno de la animo.

Ĉiu *penso*, ĉiu *voloimpulso*, ĉiu *ago* povas tuj *ŝanĝi* tiun formaĵon. –

Se vi ne estas tute enkrustiĝinta en tio materia, vi de jaro al jaro havos *alian* „animon“, kaj laŭ la instruo de praantikva saĝo vi certe ĉiun *sepan* jaron trovos *tute aliajn* animoelementojn agantaj en vi. –

Certaj animaj formoj *ripetiĝos* en vi, kaj tiujn, al kiuj vi ne havigas plenumiĝon, vi postlasos al *tiu* homaj spiritofajreroj, kiuj iam, *en venontaj tempoj*, devas travivi la surteran ekziston.

Kun tiu postlasaĵo estas ĉiam ligita la eblo *rememori* la surteran vivon de *tiu* homo, el kiu ĝi originas.

Tiel iam aliulo povos rememori *vian* vivon kaj veni al la erara kredo, ke li vivis *vian* vivon tie ĉi kaj nun ...

La regno de la animo tiel ĉirkaŭas vin, ke vi neniam povus atingi aŭ eĉ transpaŝi ĝiajn limojn. —

Kun la *animaj formoj* kristaliĝintaj je vi kaj konstante *ŝanĝiĝantaj*, vi ĉiam moviĝos en tiu *fluideca* kaj al teraj okuloj *nevidebla* „maro de animoelementoj“. — —

Sed eĉ *post* la „morto“ de la animala korpo, nenio en tiu regno havigos al vi plenan potencon, antaŭ ol *ĉiuj* impulsoj, kies *estiginto* vi estis dum via surtera vivo, trovis sian *plenan efektiviĝon* en *pli malfruaj* homoj. — —

Tiam vi mem ne plu povas ŝanĝi viajn animajn formojn.

Kiaj ili *estis*, kiam via tera animala korpo ne plu povis konformiĝi al la postuloj de la mondo de materiaj fortoj, tiaj ili devos *resti* ĉe vi ĝis la tago, en kiu ankaŭ *la lasta* el la *impulsoj* estigitaj de vi trovis sian *efektivigon* en homa spirito pli malfrue vivanta surtere ...

*Sed ne timu!*

Tiuj, kiuj *antaŭ* vi fariĝis *liberaj regantoj* en la regno de la animo, tie staros *helpante je via flanko*, kaj la tempo ĝis via vera „*releviĝo*“ ne pasos neutiligite, eĉ se temus pri „*jarmiloj*“, laŭ tera koncepto pri tempo. –

Sed kiel vi tiam eble atendos *vian liberiganton*, tiel *hodiaŭ* spiritaj homoj, *kiuj estis surtere enkarniĝintaj en antikva tempo*, atendas *vin!* –

Zorgu, ke en *via vivo* trovu sian *finan plenumigon* tio, kion de tiuj *pli fruaj homoj* vi portas en vi!

Zorgu, ke vi ne estigu *novajn impulsojn*, se vi ne *mem volas* konduki ilin al plena *elĉerpiĝo dum via surtera vivo!* – –

Vi *ja* estigu *novajn impulsojn*, sed nur *tiajn*, kiajn vi *certe* povas *mem plenumi* dum *via* surtera vivo, laŭ homa prijuĝo. —

Kion utilas al vi, se vi kreas impulsojn, kiuj laŭ *via* opinio celas la bonfarton de la tuta mondo, sed se tiam eliĝas el *via* mano tio, kion vi tiel kreis, antaŭ ol vi *mem* kapablis konduki la kreitaĵon al ties *sukcesa fino*? — — —

Al vi kaj aliaj vi tiel kreos nur *suferon*, ĉar en la regno de la animo nenio povas esti *kaŭzata*, sen efiki *ĝis siaj lastaj sekvoj* tra jarmiloj ...

Mi tie ĉi prezentis al vi per simplaj paroloj la *instruon pri la animo*, kiun la „lumantoj“ trovis jam en griza pratempo, kaj kiun scias la tre malmultaj „sciantoj“.

Se vi havas klare vidantajn okulojn kaj ne estas blindigita de *antaŭjuĝoj*, vi rekonos tiun instruon en multaj aferoj, kiujn scio de vero kaj trompaj ideoj kunteksis en multkolorajn arabeskojn.

Eble mia mano premis tro firme vian *preferatan kredon*, vian *preferatan iluzion*? — —

Sed ne *trompu* vin!

Nek en la *fiziksensa mondo*, nek en la *regno de la animo* la *okazado* iam alkonformiĝas al via bontrovo! — — —

En ĉiuj regnoj de la universo estas pretigitaj *sekuraj vojoj*, kaj nur sur *tiuj* vojoj moviĝas vivo kaj agado. —

Vi ne povas pretigi *novajn* vojojn, eĉ se laŭ *viaj* kompreno kaj prijuĝo la malnovaj vojoj ŝajnas *al vi* neireblaj.

Hodiaŭ ekzistas en okcidento multaj homoj, kiuj malklare *sentas* la kernon de vero en la instruoj de la oriento ...

Sed ili *blinde* kredas tie, kie ili *vidante* devus *kribre apartigi*. — —

En neniu popolo vi trovos „*pretan*“ *instruon*, kiu plene senvualigas al vi la *tutan veron*!

Sed ĉie vi renkontos *spurojn* de la saĝo, kaj bone estas al vi, se vi *ekkonas* ilin! — — —

Vi tiam lernos *eviti* longajn *ĉirkaŭvojojn*!

Ankaŭ *ni* volas gardi vin nur kontraŭ vojoj, kiuj estus longaj *ĉirkaŭvojoj*.

Al tio servu vin tiu ĉi instruo.

Ni donas al vi nur tion, kion ni *kun certeco scias el propra sperto*, post kiam ankaŭ ni antaŭ longe povis nur *kredi*, aŭdinte pri tio. — — —

## TROVI SIN MEM

En tiuj tagoj, kiam mi ankoraŭ devis forte lukti por trapasi la *provojn*, al kiuj miaj majstroj devis submeti min, antaŭ ol mi povis fariĝi unu el ili, mi iam estis gasto de alta majstro, pri kiu neniue en la mondo, en kiu mi vivis, estus *suspektinta*, ke li estas *majstro de la lumo*.

Kiam ni, dum unu el la belegaj vesperoj de la sudo, promenis solece laŭlonge de la marbordo, mi demandis lin, kiamaniere la luminiĝo venis al *li*, kiu ĉiam estas ŝargita per mil negocoj de la mondo, kaj la viro, antaŭ kiu tremis miloj da subuloj, ekparolis:

„Certe, ankaŭ al mi, la plejmalindulo, la spirito iam donacis sian lastan sekreton, kaj en tiu tago doniĝis al mi la forto esti saĝa ...

Tamen mi tre malofte estis saĝa dum tiu unua tempo, ĉar tro profunden en miajn medolon kaj sangon estis penetrinta tio, kio estis laŭde rekomendita al mi kiel ‚saĝo‘ de diversaj instruoj el okcidento kaj oriento – *antaŭ* ol la spirito donis al mi sian sekreton. –

Ne estas tre facile, forigi el si ĉion, kion oni kunportas kun si en ostoj kaj vejnoj kiel heredaĵon de siaj patroj, kaj kio estis ankoraŭ fortigata per edukado kaj instruado! – –

Sed venis tago, en kiu la spirito en timiga grandeco parolis al mi tiele:

*,La plej granda malbono estas timo!*

Vi ankoraŭ *timas* konfidi vin al la saĝo, kaj tiun *timon* vi nomas *dubo!* –

Mi donas min nur al *tiu*, kiu ne *timas* min!

Mi donas min nur al *tiu*, kiu, *liberigite* de ĉiu timo, scias *pensi, senti* kaj *agi* en mi mem!

Ve al tiu, kiu ankoraŭ serĉas min *ekstere!*

Ve al tiu, kiu ankoraŭ vivas en *dueco* kaj ankoraŭ ne fariĝis *,mi ‘ en mi!* – – –

Ĉio ekstera estas donita al vi, por ke vi venku ĝin!

Sed *mi* estas la *mastro* de *tio ekstera* kaj *tio interna*, kaj *vi* povos nur en *mi* – kunigite kun mi en *unu* mio – iam akiri la *regadon* super ĉio estanta *en* vi kaj *ekster* vi! – ‘

Se mi ekde tiu tago estus ĉiam aginta laŭ la vorto de la saĝo, vere, mi estus estinta *saĝa!* – –

Sed en miaj ostoj kaj vejnoj ankoraŭ vivis voĉo, kiu parolis:

,Vi malsaĝulo! –

Kiel vi povas kredi tiun vorton!?

Ĉu vi ne scias, ke vi estas *tero*, kaj *dupieda animalo?! – –*

Kiel do vi povus voli *unuigi* vin kun *tiu*, kiu *regas* kiel *mastro* ĉion eksteran kaj ĉion internan!?! –‘

Kaj mi tre ofte lasis min trompi de tiu voĉo, kaj kelktempe fidis ĝin *pli* ol la vorton de saĝo.

Mi fariĝis malgranda kaj mizera antaŭ mi mem, ĉar mi *kredis* al la *dua* voĉo kaj subfalis al la *timo*, – la timo antaŭ tiu plej alta el ĉiuj fortoj, kiu volis doni sin mem al mi. – – – – –

Tiel mi refalis en suferon kaj turmenton, kaj forgesis, kio doniĝis al mi antaŭe, en la horoj, kiam mi estis unuiĝinta kun la spirito. – –

Sed tiam, post refoja, longa erarado, aperis la tago, en kiu fariĝis *daŭra spertado* tio, kio antaŭe venis al mi nur kiel ,*dono* ‘ kaj ,*enlumiĝo* ‘.

Nur nun *mi mem* fariĝis *vivanta lumo!* – – –

Mi ne plu scias, kio mi estis *antaŭe*, kaj mi ne *volas* scii tion!

Eble mi estis kadavro, kiu loĝis en tomboj kaj per kiu sin nutris naŭzaj larvoj, – aŭ mi estis nur fantomo de mi mem, – sufiĉas, ke mi nun scias, kiu mi *estas*, kaj ke mi neniam plu povas forgesi tion. – – –

Mi supozas, ke estis nur *malgranda* tera sufero, kiu ŝajnis *al mi* tiom senfine *granda*, ke ĝi kovris la tutan mondon antaŭ mia okulo. – –

Sed al tiu malgranda sufero mi ŝuldas la *resaniĝon!*

Kiam la tuta mondo estis por mi droninta en griza tristeco, jen mi fine trovis – *min mem*, kvankam mi antaŭe jam longe havis la iluzion esti certe *trovinta* ,*min mem*‘ ...

Antaŭe mi ja kelkfoje estis trovinta min, por *momentoj* kaj *benitaj horoj*, – – sed tiam mi *re-  
duiĝis*, kaj *la aliulo*, estanta fantomo aŭ kadav-  
ro, denove ekposedis min. – –

Nun fine doniĝis al mi la forto senindulge *premsufoki* la *aliulon*, kiom ajn multe li petis kaj hurletis, rimarkinte, ke mi ne plu volis toleri lin en mi.

Tiel mi fine *releviĝis* en mi mem! – – –

Ektremetante mi nun sentas, kio mi iam *estis!*  
Lumante en propra lumo, ne komprenante,  
mi nun *scias*:

kiu mi *estas* – – –

*Mi*, kiu nun fariĝis *,mi mem‘*, kaj neniam plu povas servi *iun alian* krom mi ...

Ekde tiu tempo mi ankaŭ *scias ordoni* al aliuloj, kaj ili *obeas* min, ĉar ili sentas, ke tie ĉi ordonas iu, kiu havas la *aŭtoritaton* por ordoni.

Antaŭe mi nur *devis* ordoni, kaj oni obeis min nur kun interna kolero kaj malbonvole, ĉar mi, kiel multaj aliaj, de kiuj oni tion postulas, ne havis la *rajton* ordoni. – – –

## PRI LA PLI AĜAJ FRATOJ DE LA HOMARO

Eble jam de longe ŝvebis sur via lango la demando, kiel *mi mem* proksimiĝis al tiuj malmultaj, pri kiuj mi ofte parolas al vi en miaj libroj.

Vi certe volas ekscii, kiel tiuj homoj *unufoje* eniris en mian vivon, longe antaŭ ol mi povis suspekti, ke mi estis iam apartenonta al ili. —

Mi timas, ke vi rigardus la *unuan* renkontiĝon kiel „halucinon“, se ĝi okazus en via vivo en la *sama* maniero, kiel ĝi okazis en mia *plej frua infaneco*. —

Eble vi tre malmulte inklinas kredi, ke ekzistas eblo forlasi tiun ĉi materian korpon *sen „morti“*, kaj ke la malmultaj, kiuj havas tiun kapablon, povas vojaĝi en sia *fluideca korpo* preskaŭ pensorapide plej malproksimen, ke ili en specifaj lokoj kaj sub difinitaj cirkonstancoj povas fari sin *videblaj, palpeblaj* kaj *aŭdeblaj*, tiel ke vi neniam povus *distingi* ilin de „homoj el karno kaj sango“. — — —

Tamen tiu „kapablo“ tute ne limiĝas je la legitimaj majstroj de la „Blanka Loĝio“, kaj pli ol unu legendo ŝuldas sian originon al la praktiko de tiu „kapablo“.

Vi eĉ ne povas aserti kun absoluta certeco, ke vi *mem* ne havas tiun „kapablon“, ĉar kelkaj homoj praktikas ĝin *nekonscie*, kio signifas, ke ilia *cerba konscio* en la *maldorma, dumtaga stato* povas scii *nenion* pri ilia farado en la stato de *profunda dormo* ...

Tie ĉi ni troviĝas sur kampo, de kiu nia okcidenta scienco konas eĉ ne la *limregionojn*, kaj kiun ĝi probable *neniam povos* ekkoni detale, ĉar esplorado tie ĉi postulas *la tutan homon* kaj ne nur la *intelekton*. — — —

Sed kie oni „science“ nenion „konstatis“, tie por la plej multaj homoj nenio *ekzistas*, kaj estas tre malproksime de mi riproĉi vin, se vi tiurilate volas sekvi la opinion de la plimulto.

Mi ne scias, ĉu mi *sen* mia propra sperto ne pensus *samamaniere*. —

Sed mi nun povas diri al vi, ke tiaj aferoj ne nur estas „*eblaj*“, sed okazas *multe pli ofte*, ol

oni eble kredas en rondoj de tre „konvinkitaj“ homoj ...

La unua sendito de la unuiĝo, al kiu mi hodiaŭ apartenas, tiumaniere venis en mian vivon, kiam mi apenaŭ estis venkinta la alfabeton.

Unue mi prenis lin por almozulo, al kiu la patrino ofte donis supon, sed tiam – mi preskaŭ timas paroli pri tio – , kiam li ree kaj ree venis al mi, ĉe fermitaj pordoj, kaj subite starante antaŭ mi en kamparo kaj arbaro, kaj same subite malaperis, mia infana intelekto serĉis alian klarigon, al kiu mia maljuna amiko en granda saĝeco donis sian konsenton, kvankam, strikte rigardate, tiu klarigo estis erara.

Edukita en pia patrina mano al kredo, kiu konas „*sanktulojn*“ apud la „trono de Dio“, mi kredis, ke tiu sendito de la alta unuiĝo estas neniu alia ol tia „sanktulo“, kaj ĝuste *tiu*, kiun mi aparte *respektis* kaj kiun mi volonte imagis en la sama figuro, en kiu mia spirita gvidanto „aperis“ al mi.

La tradiciaj bildoj de la „sanktulo“ eĉ pli konvinkis min pri tiu supozo, kaj kiam mi fine

kuraĝis *demandi* lin, mi aŭdis el la buŝo de la honorinda maljuna, stranga amiko la parolojn: „Vi estas prava, mia infano, kaj *pli malfrue* vi scios ankoraŭ *pli* pri mi!“ — — —

Mi interpretis tiun respondon en infana maniero kiel senrestrikte jesan, sed gardis min malkaŝi ion al iu homo, ĉar la maljuna amiko estis dirinta al mi, ke, se mi *parolas* pri la renkontiĝoj, li *ne plu povas veni al mi*, kaj mi jam amis lin tiom, ke nenio estintus pli terura al mi ol perdi lin.

Eble eĉ tiu averto ne estus bezonita, ĉar eĉ sen ĝi la timo pro diversa eventuala mokado estus teninta mian buŝon fermita.

Iom post iom la subitaj apero kaj malapero de tiu ĉi amiko fariĝis al mi tiom naturaj, ke tute ne povis veni al mi la penso, kiom strange tiu ĉi afero diferencis de aliaj okazaĵoj.

Kiam mi aĝis kelke da pliaj jaroj, liaj „vizi-toj“ fariĝis pli kaj pli maloftaj kaj fine tute ĉesis, kio plenigis min je plej profunda doloro, ĉar mi kredis, ke tion kulpis miaj junecaj „misfaroj“.

En eduka rilato tio portempe havis bonan efikon, sed kiam mi rimarkis, ke ĉiuj miaj provoj fariĝi tre „bonkondata“ havis nenian sukceson, mi ĉesigis ilin, kaj vivis mian vivon en arbaro kaj herbejo kiel ĉiu alia sovaĝa knabo, tiel ke mi preskaŭ tute forgesis la iaman maljunan amikon.

Nur multe pli malfrue ekaperis en mi la sento, ke li tamen estas proksima al mi, kaj tiu sento estis ĉiam akompanata de sento de feliĉo, kiu estas malfacile priskribebla.

Multaj eksteraj travivaĵoj igis min klare senti, kion li rigardis kiel *bonan*, kaj pri kio li deziris, ke mi *evitu* ĝin, sed – – *mi ne vidis, aŭdis kaj palpis lin*, kiel antaŭe okazis. –

Mi preskaŭ povas diri: li kvazaŭ estis *en* mi, aŭ staris „malantaŭ mi“ ...

Tiel pasis pliaj jaroj, ĝis mi iun tagon – sub cirkonstancoj, kiuj ŝajnus sufiĉe „mistikaj“ eĉ al homo kun pli granda emo al misteraj aferoj ol mi – *denove* renkontis tiun maljunan amikon.

Tiuĉifoje en *esence alia maniero*. – –

Ĉe mi aperis vizitanto, unuavide fremda, sed jam duasekunde tre bone konata.

Tiuĉifoje ne en la orientaj vestoj, antaŭe aspektintaj al mi tiom strange, sed vestita laŭ eŭropa maniero, kun la eleganteco iom leĝera, kun kiu orientanoj kelkfoje portas eŭropajn vestojn.

Nun estis surmetataj sur mi *devoj*, kiuj *ne plu* permesis *plenan* sekretigon de la renkontiĝo, almenaŭ kontraŭ la amata virino, kiu jam en juna aĝo partoprenis en mia vivo.

Mia kunvivantino apartenis al la unuaj virinoj, kiuj eldevigis al si la rajton pri studado en universitato, kaj ŝi estis penetrita de tute skeptika, materiisma filozofio.

Leteroj, kiujn mi tiutempe devis direkti al ŝi, ĉar ŝi ne ĉeestis dum tiu unua vizito, plenigis ŝin per nedirebla timo pro la eblo de subita „mensa malsano“ ĉe mi, kaj nur la sobra konsidero, ke tiu „frenozo“ ja havas en si tromulton da „metodo“, fine dispelis la dubojn, kiuj tre facile prezentiĝas al homo kun ŝia mondrigardo.

Ŝi poste *mem* konatiĝis kun la vizitanto kaj *aliaj* de lia speco, kaj tiutempe ankoraŭ ne povis suspekti, ke tiuj vizitantoj fariĝos por ŝi *alte* *estimataj amikoj*. — — —

Inspirite de ili, ŝi trovis klarecon pri multaj aferoj, kiuj en la skriboj de la antikveco antaŭe ŝajnis al ŝi „legendecaj“, kaj kiom virino *povas* plenumi okultajn leĝojn, tiom ŝi plenumis ilin, por elfosi la trezorojn entenatajn en la misteroj de la antikva epoko, kaj ŝi trovis *pli* ol ŝi estis atendinta. — — —

Ŝia frua morto ne lasis realiĝi la planon raporti propramaniere pri tio, kion ŝi estis trovinta...

Sed mi *povas* diri al vi nur, ke *la misteroj de la antikveco eĉ hodiaŭ ankoraŭ ne estingiĝis*, kvankam ili *ne plu* ekzistas en la *tiamaj* formoj.

Mi *povas* atesti, ke ekzistas inicado, pri kiu *neniu* presita aŭ skribita libro *povas* doni *pli* ol nur *mallumajn aludojn* ...

Mi scias pri „frataro“, al kiu mi mem devis fariĝi frato, ĉar mi tiucele naskiĝis, kaj kiu estas la deirpunkto por ĉiuj unuiĝoj, kiuj sur tiu ĉi tero *iam* strebis al *plej alta ekkonado de la spirito*. —

Ni estas *tre* malmultaj.

Kion diri estas *permesate* al ni, tion ni volonte donas al la mondo, sed aparte de tio kosma leĝo devoligas nin al eterna *silentado*. – –

En pli fruaj jarcentoj, ankaŭ en *okcidento* multaj eminentaj homoj estis en tre proksima rilato kun nia unuiĝo, – de filozofo ĝis armeestro, de monaĥo en sia ĉelo ĝis kardinalo en la kortego de l' papo ...

En la nuna tempo, la homoj, kiuj estas en spirita interligo kun ni, troviĝas pli en la vasta *oriento*, kaj estas multaj inter ili, al kiuj malmulte plaĉas, ke la unuiĝo nun ree turnas sin pere de mi en klara lingvaĵo al la homoj de l' okcidento.

Sed tio *devis* okazi, kaj mi ricevis tiucelan komision, ĉar ekcirkulis en la okcidentaj landoj pli aŭ malpli *torditaj*, pli aŭ malpli *fabelecaj* famoj pri la ekzisto de tia „frataro“, lanĉitaj de homoj bonafide supozantaj esti en rilato kun ni, ĉar forlogis ilin al tiu supozo strangaj sanktuloj, – de kiuj ekzistas tre diversaj specoj en oriento, – post kiam virino, kiu estis unuaranga *media fenomen*o, estis sciiĝinta *pri la ekzisto* de la „frataro“.

Ekzistas ankoraŭ *aliaj* rondoj en la tuta mondo, kiuj *je siaj deirpunktoj* ne estis malproksimaj de ni. –

Ni hodiaŭ vidas iliajn reprezentantojn iri sur eraraj vojoj.

*Ni devas senage rigardi, lasante tion okazi.* –

Estas permesate al ni doni al *ĉiuj* nur tion, kio *povas* esti donata al ĉiuj.

Estas permesate al ni montri nur *la vojon*, kiu kondukas spiritamaniere al nia sfero de influo. –

Vi ne lasu vin forlogi al la opinio, ke la utilo, kiun la homaro povas atingi per ni, estus alportebla al ĝi per la *persona* publika elpaŝado de iu membro de la „frataro“.

En nia *persona* agmaniero en la *ekstera* mondo ni estas grave ligitaj de diversaj rigoraj leĝoj.

*Ni mem* povus en *persona* proksimeco doni *malpli* ol homo, kiu *konas* kaj *komprenis* nian instruon, sed ne estas *ligita* de tiuj leĝoj.

*Malobeo* al tiuj leĝoj, kiu dum *persona* agado en la ekstera mondo estus preskaŭ *neevitebla*, pli aŭ malpli frue postulus tute eviteblajn *oferojn*, kaj laŭeble *eviti* tiajn „oferojn“ estas por ni *plej alta* leĝo. – – –

Pri la *vojo*, kiu kondukas en la *spiritan* sferon de influo de la „frataro“, pri la *natur*o de tiu frataro kaj ĝiaj *kosmaj interrilatoj* mi sufiĉe parolis en miaj libroj.

Se vi *volas* iri la *vojon*, vi certe iam povos atesti la agadon de la *spirita*j fortoj, kiuj estas direktataj de la unuiĝo *kvazaŭ de organa tuto*.

Ili originas *ne de ni!*

Ni estas nur iliaj vokitaj direktantoj kaj perantoj.

Sed gardu vin, ke vi ne „ludu“ kun tiuj fortoj!

Kiu tie ĉi ne konscias la *gravecon* de tio, kion li faras, tiu praktikas *danĝeran* ludon! — — —

*Tion*, kion vi povas *trovi* pere de ni, vi ankaŭ ne devas rigardi kaj serĉi kiel iun „sciencon“ de tiu ĉi tero. —

Ankaŭ ne kredu, ke „*asketismo*“ aŭ *vegetara dieto*, *abstinado de alkoholo* aŭ de *seksaj rilatoj*, aŭ *iu ajn stranga vivmaniero* estas „*necesa*“ aŭ nur *utila* por atingi la celon!

Ĉiu tia asketa aŭ superstiĉa kutimo, kiu konduku al la atingado de *spirita* celo, estas rezulto de unu el la *plej maldignaj kaj sterilaj* mondri-

gardoj, kiu tamen paradas fiere inter ĉiuj popoloj kaj en ĉiuj religiaj vestoj. — — —

Sed kiu *volas* veni al ni, por ke ni *povu* doni al li *spiritamaniere* tion, kion li serĉas, tiu estu sobra, bonkora, kvieta, sed — *terokolora* homo!—

Lin la alta unuiĝo certe povos atingi.

Li ekhavos ĝiajn donojn en ĉiu *loko* de la tero kaj en ĉiu *stato* de ekstera vivo, kaj *des pli frue*, ju pli li penas, — antaŭ ĉio kion li *spirite* alstrebas, — *plenumi siajn terajn devojn* al si mem, al siaj proksimuloj en la mallarĝa senco, kaj al la homaro ĝenerale. — —

## MAGIO

La trembrilanta, blanka lumo de la suda luno fluis malsupren je la rokflankoj de la senplantaj montoj kaj plenigis la vastan valon kun ĝiaj olivarbaroj kiel lagon.

La pecoj de marmorkolonoj de la ruiniĝinta sanktejo lumis kiel opaloj, kaj sur la slaboj kuŝis silka kovraĵo de bluite blanka lumado: aspektis tiel, kvazaŭ ĉio estis kovrita per ĵus falinta neĝo.

La du viroj silente trapaŝis la sanktajn lokojn de antikva tempo, ĝis ili venis al la fundamentoj de malnova templo kaj tie sidiĝis.

„Tiun ĉi templon“, diris unu el ili, „antaŭ jar-miloj fondis unu el la *niaj*, kaj dum jarcentoj ĝiaj pastroj staris sub nia gvidado ...

Legendo de la popolo poste diris, ke unu el ĝiaj *dioj* estas la fondinto de la sanktejo.

La loko, kie ni ripozas, *eĉ hodiaŭ* estas mistera, sed la homoj de tiu ĉi tempo scias plu *nenion* pri ĝia mistero ...

Kie ajn iu el ni antikvatempe fondis tian sanktejon, tie li serĉis al si lokon, kiu estu taŭga

por elfluigi *certajn fluidecajn fortojn* de la tero, kio eblas tute ne *ĉiuloke* sur tiu ĉi planedo.

Hodiaŭ tiuj fontoj de fluidecaj fortoj jam antaŭ longe elĉerpiĝis en la plej multaj de tiuj lokoj, sed la fortoj, kiuj tie iam efikis, ankoraŭ estas koncentritaj tiuloke kvazaŭ sur punkton de altiro; ili ankoraŭ sekvas la samajn vojojn, kiuj iam instigis la kreinton de la sanktejo fondi templon en tiu loko kaj eduki pastrojn por sankta servado.

La pastroj de tiuj temploj estis tute ne dekomence la „trompantoj“, kiel kiujn oni devas rigardi ilin hodiaŭ, kiam oni suspektas plu nenion pri la misteraj fortoj tie efektivigitaj pere de vera *magio*, de kiu la mondo konas ankoraŭ nur la *nomon*, kiun ĝi donis kiel mantelon al la trompo kaj trompemo.

Vere *ekzistis* alta magio, kaj ekzistis *magiaj lokoj* sur tiu ĉi tero; oni eĉ *nun* povus trovi ilin, se oni scius *serĉi*.

Sed la homoj de la nuna tempo *ne plu kapablas serĉi* tiamaniere, ĉar ili iom post iom lasis en si perdiĝi la fortojn, kiujn ili *bezonus* por sukcesa serĉado.

La homo estas ligita kun la fortoj de la tero pli intime, ol kiom li, tro fidante al la nura ŝajno, povas kredi.

Sennombraj fortoj de la tero estus liaj servantoj, se li disvolvus *en si* la *potencon*, al kiu tiuj fortoj devas obei ...

Se oni povus *instrui* disvolvi en si tiun potencon, tre baldaŭ la tuta mondo sidus je la piedoj de tia instruanto. –

Sed la disvolvado de tiu potenco esta ligita al *interna kreskado*, kaj antaŭ ol fariĝis *luma kaj klara* la *plejinterno* de homo, tiel ke ĉe fermitaj okuloj li povas vidi *en si mem* ĉion, kion li vidi *volas*, li *ne* povas *trovi* en si tiun potencon, nek iam lerni *uzi* ĝin.

Li eĉ ne *suspektas*, pri *kio* oni parolas, kiam oni rakontas al li ion pri la potenco en lia propra interno. – –

Eĉ kiam oni kuraĝas paroli pri la ‚povo vidi ĉe fermitaj okuloj‘, neniuj scias, *kio estas tio*, kaj la plej multaj kredas, ke ili jam de longe havas tiun povon, ĉar ili konfuzas la formitaĵojn de sia *fantazio* kun vera *interna vidado*. –

Kion signifas, ke ĉio en la interno fariĝu *klara* kaj *luma*, tion ili neniam povas ekkapti, kaj ili opinias, ke tiu klareco estas la *klareco de la intelekto*, la strikte logika *pensado*. — —

Ili ankoraŭ ne suspektas, ke *super* tiu multe laŭdata ‚pensado‘, — kiu *por ĉiam finiĝas*, kiam la tera korpo disfalas, — ekzistas alia pensado, en kiu *la penso mem* fariĝas viva kaj konscia pri si mem, tiel ke ĝi, *malligite* de ĉia terligita ‚pensado‘, kapablas *pensi sin mem*. — — — —

Ekzistas strangaj ‚instruantoj‘ en mia lando, — kaj ili ankaŭ trovis la vojon al vi en okcidento, — kiuj volas instrui al siaj disĉiploj la arton ‚regi la pensojn‘, vidante en ĝi ĉian savon, ĉar ili trovis delikatan spuron de la vero kaj malkovris, ke tie ĉi ekzistas interligiteco kun la *penso* ...

Se tiuj malsaĝuloj povus ekkapti, ke povas veni al la vero *neniu homo*, en kiu ne *vekiĝas la vivanta*, *pri si mem konscia penso* kaj fariĝas *mastro kaj majstro*, ili kun terurego vidus, kiel ili subigas sin mem kaj aliajn *al senutila torturo*, kiu kondukis ne malmultajn al la rando de frenezo, se ne al *plena vualigo* de ilia menso ...

Ili igas siajn disĉiplojn sidi trankvile kaj tiam sin ,koncentri‘ sur unu solan penson de la cerbo.

Ili volas atingi, ke ili mem kaj iliaj disĉiploj kapablas resti *sen* iu penso dum minutoj kaj pli longe, kaj kredas tiel finfine ricevi la lumon de vero.

Sed tiel ili atingas nur *ruinigon de la nervoj* kaj de la *cerbo* en tiu ĉi fizika korpo. – –

La ,spiritaj travivaĵoj‘, kiujn ili kredas sperti, estas *neniam* io alia ol la rezultoj de la kontraŭ-natura ekscitado de iliaj fizikaj *nervoj*. –“

„Oni do prefere devus“, diris la alia, „*averti* kontraŭ ĉia ,pensa koncentriĝo‘ kaj ĉia ,regado de l’ pensado‘, ĉu ne? –“

Sed la unua parolinto ne lasis lin daŭrigi kaj replikis:

„Absolute ne, mia amiko! –

Dependas nur de tio, *kion* oni volas *atingi*, kaj *kiel* oni komprenas tiun konsilon! – –

Se temas nur pri la tasko, deturni de ĝia *senplana vagado* tiun ,pensadon‘, kiu estas farata per plej subtilaj *fizikaj organoj*, do per la *cerbo*, kaj povas fariĝi ,konscia‘ per la samaj organoj,

– tiam vi povas ĉiam rekomendi la uzon de ĉiuj rimedoj, por koncentri sur unu punkton *ĉi tiujn* ‚pensojn‘, kiuj estas nur reflektoj de la *reala* penso en la miloj da spegulfacetoj de la cerbo.

La pensanta homo, kiu propre estas ankoraŭ nenio alia ol pli alta ‚animalo‘, povos tre bone utiligi sur tiu ĉi tero la kapablon tiumaniere *direkti* la laboron de sia cerbo.

Vi ankaŭ instruu lin, ke li kutimigu siajn ‚cerbopensojn‘ al *obeemo*, por ke li ne fariĝu ilia sklavo.

Li lernu *firme teni tiujn* pensojn, al kiuj estas *permesate* direkti lian faradon, sed doni *nenian atenton* al ĉiuj aliaj. – –

Li sciu, ke li nur detruas *siajn nervojn*, se li volas forigi el si nefruktodonajn aŭ pereigajn pensojn *per batalado* kontraŭ ili, sed ke li *facile* ilin *mastras*, se li lasas ilin *tute neatentitaj*, kiom ajn forte ili ree kaj ree provas penetri en lian konscion.

Li devas scii, ke li *neniam*, krom *je la kosto de siaj nervoj*, povas esti *sen pensoj*, sed ke li havas la *potencon* doni sin al la *volataj* pensoj kaj samtempe, en plena trankvileco, lasi la *ne-*

*volatajn* pasi preter si, kiel bildojn, kiuj plu nenion havas por diri al li. — — —

Tiu *konstanta* ekzercado, kiu iom post iom fariĝas *kutimo*, kreas trankvilon kaj ordon en la pensado bezonanta la cerbon, kaj tiuj trankvilo kaj ordo estas la unua kondiĉo, se la homo volas iam atingi, ke li veku el ĝia dormo la vivantan *pra-penson*, kiu *konscie sentas sin mem*.

*Vekinte* ĝin, — sed en tio sukcesas apenaŭ unu el dekmil homoj, nur pro tio, ke tiom malmultaj *kuraĝas* vekti ĝin, — tiam aperos al li ĉiu „pensado“, kiun *solan* li, same kiel ĉiuj aliaj homoj, povis *antaŭe* praktiki, nur kiel la *ombro* de lumo, kies plej malproksimajn radiojn li ĝis tiam apenaŭ suspektis. — — — — —“

„Ĉion, kion vi diras, ho honorinda,“ respondis nun la alia, „mi ja povas mem konfirmi laŭ mia propra sperto, kiu doniĝis al mi per via granda bonkoreco.

Sed mi dankus al vi, — malgraŭ ĉio, pri kio *mi mem* sciiĝis, — se mi povus aŭdi el *via* buŝo, dum ni ankoraŭ kunestas, kiel *vi mem* scias priskribi per homaj vortoj la potencon, kiu estas kaŝita en la homo kaj kiu estis transdonita al ni

en konstanta intersekvado: *la potencon super sekretaj fortoj de la tero.*

Kaj la honorindulo parolis:

„Ne pensu, ke mi perdis la fadenon en mia parolo!

En tiu ĉi sankta loko kaj en tiu ĉi horo mi volis montri al vi nur *la vojon de la vortoj*, kiun vi sekvu, se vi volas sciigi la homojn de okcidento pri tiu alta, vera *magio*, kiun vi mem nun konas kaj pri kiu ili kredas, ke ĝi estas nur produkto de pia aŭ senhonta trompo.

Tial mi nun devis fari la klaran distingon inter tio, kion la homoj nomas ‚pensado‘, kaj la *vivanta, pri si mem konscia penso*, kiu en ni, kiuj ĝin vekis, estas la *majstro* de ĉiuj ‚majstroj‘, ĉar *ĝi sola* donis al ni la *potencon*, per kiu ni povas ordoni al la sekretaj fortoj de la tero.

Sed nun diru al la homoj de okcidento, ke ili komprenas tiun potencon *en erara maniero*, – diru al ili, ke neniu el ili povas akiri tiun potencon *el si mem*, – ke estas nur *unu*, kiu tenas en sia mano la *ŝlosilon* de tiu potenco, kaj al kiu ankaŭ ni ŝuldas ĝin, – sed ke ankaŭ ni ne estus ricevintaj ĝin, se ne *antaŭe* estus vekiĝinta en ni

*la vivanta, pri si mem konscia penso el sia multmiljara dormo, se ĝi ne estus atinginta en ni senmortan reĝadon kaj gloron! — — —*

La homoj ankoraŭ kredas, ke tiu potenco estas la *rezulto* de *ekstera agado*, ke ĝi postulas de tiu, kiu posedas ĝin, la praktikadon de artoj nomataj ‚magiaj‘, kaj ke ĝia efiko dependas de ‚ritoj‘ kaj ‚ceremonioj‘.

Vi ne volu kaŝi, ke fakte *ekzistas* ankaŭ speco de malalta kaj nur portempa regado super certaj sekretaj fortoj de la tero, regado, kiu *povas* esti efektivigata per tiaj praktikoj, — sed vi ankaŭ diskonigu kun plena klareco, ke ĉio ĉi estas neniel interligita kun *tiu* potenco super fortoj de la tero, kaj pere de ili super *kosmaj* fortoj, kiun oni prave povas nomi la alta *magio de la spirito*. — —

La ‚magio‘, kiu efikas per *eksteraj rimedoj*, per ‚ritoj‘ kaj ‚ceremonioj‘, kaj dependas de certaj *eksteraj praktikoj*, rilatas al la *magio de la spirito* samamaniere, kiel la ‚penso‘, kiu bezonas la *cerbon* por sia manifestiĝo, rilatas al la *eterna, pri si mem konscia kaj sin mem pensanta penso*. — — —

Provu doni al la homoj de okcidento klarecon pri tio, ke la *sola* efikilo de la dia magio de la spirito estas la *volo*, *kiu ne plu estas regata de iu ajn deziro*, kaj ke tiu volo regas el si mem super vastaj regnoj de la sekretaj fortoj de la tero. —

Klarigu al ili, ke ni mem devis doni nin en intiman *ligitecon* al eternaj leĝoj, kiam ni atingis en ni tiun *sendeziran volon*, kaj ke ni plu neniel povas fari, *‘kion ni volas’* (tie ĉi la tera homo ĝenerale komprenas sub *volado* sian *deziradon*), sed ke ni devis *unuigi* nin kun la *eterna volo*, kiu nun en nia volo volas *sin mem*, senkonsidere al niaj deziroj, se ili volus kontraŭi ĝin. — —

Diru al la homoj, kiujn vi instruos, ke ni definitive *subordigis ĉiujn* niajn *dezirojn* al la *eterna volo*, tiel ke nia volo estas *libera* de ĉiu *deziro* kaj efikas nur *el si mem*, servante la *eternan volon* kaj plej intime unuigite kun ĝi ...

Oni apenaŭ komprenos vin tuj ĝuste, ĉar la homoj, inter kiuj vi agu, tro forte kutimiĝis enpremi ĉiun *novan* instruon en la formojn de

*malnovaj* instruoj, ĝis ĝi, kvazaŭ fariĝinte malnova instruo, ŝajnas al ili ,komprenebla‘.

Certe, vi donas al ili *la plej malnovan spiritan instruon en la mondo*, sed vi neniam forgesu, ke *elementoj* de tiu instruo atingis ilin en ĉiu tempo, kaj ke el tiuj *elementoj* ili ĉiam kreis *instruojn*, kiuj *intermiksas eraron kaj veron* en konfuzaj arabeskoj.

Mi ankaŭ ne dubas, ke multaj el iliaj *plej novaj* instruantoj de ,praantikva saĝo‘ kun ĝojo servus al la vero, se ili povus *ekkoni* la veron kaj ne estus katenita de la iluzio: jam certe posedi la veron.

Estos via propra tasko, plej zorge kaj klare apartigi vin de tiaj ,instruantoj‘, kaj kiel vi scias, ni tute ne konsentas kun vi en via opinio, laŭ homa vidmaniero facile komprenebla, ke la homoj instruitaj de tiuj instruantoj estas plej bone preparitaj por ricevi la veron.

Se vi volas serĉi viajn disĉiplojn inter tiuj homoj kun erarŝargita scio, vi faros tion *je via propra risko* kaj je via *persona* respondeco. –

Kvankam vi estas unuigita kun ni *en organa spirita unuiĝo*, ni devas lasi al vi ĉian *personan*

liberecon, sed *vi sola* portas la respondecon en *ĉi tiuj aferoj*.

Se vi tie *ĉi* ne volas sekvi nian konsilon, tio okazu, kaj ankaŭ via *estonta* ekkono, ke ni konsilis vin *ĝuste*, servos al vi kiel *progresigo*, kiu certe valoras iun aŭ alian seniluziigon.

Ni konsilas al vi: – instruante, turnu vin *al ĉiuj, kiujn vi povas atingi*, tiel kiel la pluvo falas kaj sur fekundan kamparon kaj sur rokan landon!

Ankaŭ en ŝtonkovrita solejo plantoĝermoj atendas sian disvolviĝon ...

Ne devas *ĝeni* vin, *ĉu vi scias* pri unuopuloj trovantaj la vojon al la vero per via instruo, aŭ ne. – –

Estas *via* tasko, montri al la homoj de okcidento en via maniero la saĝon de la plej interna oriento, saĝon, kiu estis tiom longe vualita kaj kaŝita.

Vi scias, ke *aliaj* el ni, kiuj vivas en plena kaŝiteco, havas la taskon *serĉi* la junajn ĝermojn, kiuj sekve de la fekundiga pluvo de via instruo en la landoj de okcidento nun strebas al sia disvolviĝo.

Vi ne devas lasi vin forlogi de kiu ajn, *doni al vi mem taskon*, kiun *ni*, la organe unueca spirita unuiĝo, *ne donis al vi*. — — —

Vi ankaŭ ne devas lasi vin senkuraĝigi, se vi mem ne povas ekkoni ‚sukcesojn‘ de via instruo.

Vi ree kaj ree disvastigu la instruon al vi konfiditan, vi ĉiam denove donu la saman instruon per la samaj aŭ similaj vortoj, sen atenti pri tio, *kiu* pretas aŭskulti vin kaj *kiu* intencas sekvi vian instruon.

Ni volas, — *ni*, kiel organa spirita unuiĝo, — ke vi, nia frato, donu al la homoj de okcidento la eblon ekkoni, ke eĉ hodiaŭ vivas tiuj ‚misteroj‘, pri kiuj la kleruloj inter ili scias el la historio.

Ni volas, ke komenciĝu *nova tempo de plej profunda spirita reviviĝo* sur tiu ĉi tero, kaj ni kredas, ke la popoloj de okcidento iam *dividos kun ni la maturajn fruktojn*, kiujn ili povas ricevi el la semo, kiun ni donis al ili per vi ...

Vi scias, ke vi kiel tera persono povas esti nur la *peranto* de saĝo, kiun vi neniam estus ricevinta, se ne unu el tiuj, kiuj ekde praa tempo

sendas al la homaro sian helpon, estus konscia-  
vole *unuiginta* sin kun via spirito, antaŭ ol vi  
estis naskata surtere kiel filo de via patrino.

Ni komprenas, ke estus *pli konforme* al via  
natio, reteni vian saĝon *ĉe vi* kaj kviete iri vian  
teran vojon, sed ni *devas devontigi* vin *al in-*  
*struado*, eĉ se per tio ni metas sur vin ŝarĝon,  
kiu eble de tempo al tempo tre premas vin. — —

Instruu al la okcidenta mondo, ke la magiaj  
fortoj de tiu ĉi tero *ne malaperis*, kaj ke ili at-  
endas novan homaron, kiu reutiligu ilin.

Instruu al ĉiuj demandantaj vin, kiel ili povas  
revivigi en si mem la magian poluson.

Instruu ilin, ke *esti preta renkonti* altajn for-  
tojn povas revoki ilin *en la vivon!*

Instruu ilin, ke ĉiu rajto pri pli alta interna  
spertado baziĝas nur sur la *interna memtenado*,  
neniam sur la impeteco de la *deziro!*

Instruu ilin, ke la mesaĝo de l' spirito estas  
ricevebla nur en *plena trankvileco de la animo!*

Instruu ilin, ke nur *minimuma* parto de la *ka-*  
*pabloj de ilia animo* montriĝas al ilia konscio!

Instruu ilin, ke ili fidu *nenion* ol *la propran plej internan ,mion‘*, kiu *aŭtomate* altiras ĉiun helpon, kiun ĝi bezonas!

Diru al ili:

*La ,mi‘ estas via fonto de ĉia forto!*

*Nur en la ,mi‘ vi trovas vin mem!*

*En la ,mi‘ speguliĝas ĉio reala!*

*La ,mi‘ estas la fonto de ĉiu scio pri finaj vero kaj realo!*

*La ,mi‘ estas la forumo, kie vi renkontos ĉiujn spiritojn de la senlima ekzisto!*

*En la ,mi‘ estas donita la forto, kiu povas lerni majstri ĉiujn fortojn!*

*La ,mi‘ estas eterne kvietaj. — —*

*Kiu atingas la grandan kvieton, tiu povas trovi en la ,mi‘ la plej altajn fortojn!*

*En la ,mi‘ vi trovas la ĉion ampleksantan, eternan spiriton!*

*Nur en la ,mi‘ povas naski sin al vi via vivanta Dio!*

*Sed la tera korpo devas lerni kredi je la eterna ,mi‘!*

Plue diru al ili:

*Neniu venas al la konscio de sia eterna ,mi‘, kiu ne povas forgesi, kio li antaŭe estis! – – –*

*,Mi‘ estas: ne io, – ne objekto, kiu povus esti ekprenata, nek ,estaĵo‘, – do ĝi estas ,nenio‘, sed la nenio, kiu estas ĉio: – – la formo de unueco de ĉio estanta!*

*Vi vere estas nur en tiu ,nenio‘!*

*Se vi sentas ĝin kiel vian ,mion‘, tiam vi trovis en vi mem ĉion, kio estas!*

*,Mi‘-konscio estas la konscio pri tio, ke oni portas la ,centron‘ de ĉia estado en si mem. – –*

*Tiele instruu la homojn de la okcidenta mondo, kiuj sin konfidis al via instruo, kaj vi gvidos ilin al ilia plej alta celo.*

*Neniu havas la saman ,plej altan celon‘ kiel aliulo.*

*La ,finaj celoj‘ estas diferencaj, kiel la steloj de l’ ĉielo diferencas inter si laŭ grandeco.*

*Sed ĉiu homo povas, ĉi tie surtere, atingi en sia maniero la ,plej altan celon, kiu estas destinita al li sola!*

*Gvidu ĉiun el la homoj, kiuj sin konfidis al vi, al lia plej alta celo, sed avertu ilin ne rigardi la ,plej altajn celojn‘, kiujn povas atingi nur*

malmultaj en ĉiu tempo, kiel *siajn* „plej altajn celojn“.

Diru al ili, ke *sufiĉas* atingi *sian propran* „plej altan celon“, sed ke *pereo* rezultas, se oni strebas al la „plej alta celo“ de *aliulo*, eĉ se ĝi superas la *propran* „plej altan celon“ per ĉiela alto!

Tiel gvidu la homojn de okcidento *sur rektaj vojoj* al tiu *lumo*, kiun ili hodiaŭ serĉas sur *kaŝaj padoj*, opiniante, ke ĝi ne aliamaniere estas atingebla!

Mi nun forlasas vin en mia tera formo, kaj aliaj el niaj fratoj renkontos vin por paroli kun vi per teraj vortoj.

Sed neniu havos *alian* konsilon por doni al vi, kaj baldaŭ *vi mem* konsilos al vi laŭ *propra* konsilo en *sama* maniero, ĉar kiel ni estas unu en spirito, tiel ĉiu apartenanta al ni estos, post mallonga tempo, *unuanima* kun ni en la aferoj, kiujn li *sola* konsideras por si mem. — — — “

Dum tiu instruado la juna tago estis iom post iom leviĝinta, kaj la unuaj radioj de la ascen-

danta suno jam origis la krenelaron de la montoj.

Profunde malsupre kuŝis en la foraĵo la nigre blua suda maro.

Jen kelkaj homoj venis sur la vojo kondukan-ta preter la ruinejo de la malnova templo. Ili havis ŝargobeston kun si kaj atendis la altan majstron.

Tiu ĉi adiaŭante brakumis sian pli junan fraton, sidiĝis sur la ŝargobesto kaj foriris kun tiuj homoj en la direkto al fora celo. Sed la plijunulo, akompaninte la malgrandan grupon da migrantoj sur mallonga parto de la vojo, lastfoje salutis, returniĝis, kaj en la unuaj radioj de la matena suno iris al sia restadejo, pripensante la vortojn de la alta frato en sia koro kaj estante preta agi laŭ ili. — — — —

Finiĝas tiu ĉi „libro de interparoloj“ per tio, ke mi lasis vin partopreni en dialogo, da kiuj okazis multe kaj kiuj fariĝis la kaŭzo, ke tiaj libroj devis esti skribataj de mi.

Ne malmultaj jaroj pasis post tiu nokto en la ruinoj de sanktejo de la Malnova Mondo, kaj

jam longe la viro tie instruita ne plu bezonas  
*demandi ...*

Jam longe li estas egala al siaj fratoj en ĉio. –

Sed la *tasko* donita al li ĝis nun atingis nur la  
*komencon* de sia plenumado.

Ankaŭ tiu ĉi „libro de interparoloj“ helpu  
kontribui al ĝia *tuta* plenumado!

Ĝi servu al vi por *solvi multajn demandojn!* –

Fino

Tradukoj de pliaj libroj  
el la spirita verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>